

ILEI

# La 3a ILEI-Seminario en Orienta Azio

Seminaria temo: Esperanto-instruado en lernejo




En la 3a ISOA en *Sangju* Trejna Instituto de Meditado ĉe centrejo de Ŭonbulismo en Iksan, Koreio

Kiam : 21(lun.) ~ 24(mek.) januaro 2013

Kie : Sangĝu-Meditejo en Iksan, Koreio

Ĉeforganizanto : Korea sekcio de ILEI

Kunorganizantoj : Ĉina kaj Japana sekcioj de ILEI



## Preparkomisiono por la 3-a ISOA

Estro : LEE Jungkee (Ŝlosilo) / [esperanto@saluton.net](mailto:esperanto@saluton.net)  
Vicestro : PARK Yongseung (Nema) / [esabpark@korea.com](mailto:esabpark@korea.com)  
Sekretario : OH Soonmo (Brila) / [soonmo1010@hanmail.net](mailto:soonmo1010@hanmail.net)  
Komisionanoj : CHO Myung-ja (Ĝoja) / [ds2edr@hanmail.net](mailto:ds2edr@hanmail.net)  
HAN Sook-hee (Kristalo) / [kristala@hanmail.net](mailto:kristala@hanmail.net)  
Choi Eun-Suk (Esti) / [istelchoi@hanmail.net](mailto:istelchoi@hanmail.net)  
LEE Youkyoung (Lumera) / [nnohill@gmail.com](mailto:nnohill@gmail.com)



# Enhavo

Salutmesaĝo de prez. de ILEI .....	3
Salutparolo de estro de ILEI–Koreio .....	4
Salutparolo de estro de ILEI–Ĉinio .....	4
Salutparolo de estro de ILEI–Japanio .....	5
Programo (kun malferma ceremonio) .....	6
Duontaga ekskurso : Jeonju, Urbo de Kulturo kaj Arto (Choi Eun–Suk) .....	7
Seminarioj de la 3a ISOA .....	16
• La utileco de Esperanto en mia profesia kariero : MARKUS Gabor .....	17
• Universitata Esperanto–edukado en Koreio : LEE Jungkee .....	20
• La junulaj movadoj de Esperanto en Heilongjiang Provinco, Ĉinio : SONG Ping .....	26
• Esperanto–Instruado en japanaj lernejoj : ISIKAWA Tiekō .....	27
• Komunaj problemoj pri E–instruado/lernado en ĉinaj altlernejoj : GONG Xiaofeng .....	32
• Ĉiutaga Esperanto! : PARK Yongseung .....	34
• Lernolibro kaj Kurso : YAMASITA Tosihiko .....	37
• Principoj por la 125–parta retkurso : Stefan MacGill .....	45
• Amuza lando de Esperanto : MA Youngtae .....	50
• Mi kaj “mia biciklo” : XIONG Hui .....	52
Poste, .....	55
• Raporto pri la 3a ISOA : LEE Jungkee .....	56
• Partopreninte en la 3a ISOA : GONG Xiaofeng .....	57
• Partopreninte en la 3a ISOA : ISIKAWA Tiekō .....	59
• Organizantoj .....	61
• Prelegantoj .....	62
• Partoprenantoj .....	63
• Memoraĵoj .....	66
• Adresaro de partoprenantoj .....	66
• La Espero .....	71



● Salutmesaĝo de prez. de ILEI

## En Azio, ni instruu efike!



En 2012 ILEI sukcesis duobligi la nombron de siaj aziaj sekcioj - de tri ĝis ses. Tiujare ni ĝuis nian trian azian konferencon - la rekorde grandan eventon en Kunmingo. Tre bonvena estas la aktiva kunlaboro inter aziaj sekcioj, precipe en la organizado de ISOA (ILEI-Seminario en Orienta Azio), kies trian okazigon ni nun festas. Esperanto vere havas sencon nur kiam ĝi kunvenigas homojn kun malsamaj lingvoj kaj kulturoj; tial estas dezirinda la internacia karaktero de la aranĝo. Azianoj sendube havas pliajn obstaklojn lerni Esperanton kompare kun posedantoj de hindeŭropaj lingvoj; indas ke viaj seminarioj traktu manierojn superi tiujn defiojn. Indas percepti tiun defion kiel avantaĝon - akiro de Esperanto, kiel logikigita ekzemplo de la eŭropa lingva modelo, provizas efikan sojlon al la posedo de ege pli komplikaj etnaj eŭropaj lingvoj.

Ni fidas, ke la 3a ISOA servos fortigi niajn tri novajn sekciojn en Mongolio, Nepalo kaj Vjetnamio, tiel ke ili aldoniĝu al la tri tradiciaj sekcioj: la japana, korea kaj ĉina. Kadre de ILEI, ni ĉiam pensu antaŭen - kiuj povos esti la sekvaj tri sekcioj? Jen puraj divenoj, laŭ nunaj imagoj kaj esperoj: indonezia, pakistana kaj hindunia (barata). Ĉu? Ĉiukaze, viaj klopodoj bezonatas apogi unuopulojn kaj grupojn tra la kontinento. La estraro de ILEI unuafoje enhavas du azianojn, kio substrekas nian kredon, ke movada fortigo atendeblas kaj atingeblas tra la kontinento, precipe rilate al la instruado de la lingvo.

ILEI deziras al vi produktivajn sesiojn, fake valorajn prezentaĵojn kaj vere transkulturajn spertojn!

Stefan MacGill  
Prezidanto de ILEI

● **Salutparolo de estro de ILEI-Koreio**



Kun ĝojo ILEI-anoj de Koreio bonvenigas vin al la 3a ISOA, kiu okazas en Koreio. La 1-a ISOA en Tianjin kaj la 2-a ISOA en Kunming, kiuj okazis en Ĉinio, estis tre sukcesaj kaj enhavriĉaj. Tra du fojaj seminarioj, ni tri landaj ILEI-anoj rimarkis, ke la seminarioj estis tre utilaj kaj efikaj placoj, en kiuj oni povis dividi niajn spertojn, kiujn ni gajnis tra Esperanto-instruado.

Oni diras, ke la 21a jarcento estas epoko de Azio, sed kadre de Esperantujo azia movado estas malpli prospera ol tiu en Eŭropo, precipe je lingva nivelo. Honeste dirite, ni, aziaj esperantistoj devas klopodi levi sian lingvo-kapablon por engaĝiĝi en la internacia Esperanto-medio. En tiu senco, la tasko kaj misio de ILEI-anoj en Azio estas pezaj, kaj atendas nin multaj farendaj laboroj lige al edukado de Esperanto.

Mi esperas, ke en la 3a ISOA ni seminarianoj havos fruktplenan rikolton tra diversaj prezentaĵoj kaj sekvontaj liberaj diskutoj. Bv. havi agrablan tempon kun seminarianoj kaj korea etoso dum via restado en Koreio. Koran dankon!

**LEE Jungkee**  
Estro de korea sekcio de ILEI

● **Salutparolo de estro de ILEI-Ĉinio**



Okaze de la 3-a ILEI-Seminario en Orienta Azio(ISOA), mi, nome de Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj, salutas al ĉiuj ĉeestantoj el Japanio, Koreio, Ĉinio kaj aliaj landoj.

Ni kolektiĝas de diversaj lokoj ĝuste por ke interŝanĝu opiniojn kaj klopodu trovi solvon de la problemoj, kiujn ni azianoj eble renkontas dum la instruado kaj lernado de Esperanto.

La sukcesa okazigo de antaŭ du sesioj donis al ni belan prospektivon en la flanko de trilandaj kunlaboroj. La ISOA ankaŭ fortigas la amikecon kaj kunlaboron inter kolegoj de la aziaj landoj. Mi esperas, ke ni daŭre kunlaboru en edukaj kampoj, kaj espereble elbaku pli da novaj esperantistoj en Azio. Grandan sukceson al la 3-a ILEI-seminario en Koreio!

**GONG Xiaofeng**  
Estro de ĉina sekcio de ILEI

● **Salutparolo de estro de ILEI-Japanio**



Karaj organizantoj kaj partoprenantoj de la 3a ILEI-Seminario en Orienta Azio en Iksan, Koreio!

Je la nomo de la japana sekcio de ILEI mi salutas vin ĉiujn. ISOA jam dufoje okazis en Ĉinio, kaj ne nur ni ILEI-anoj en Ĉinio, Koreio kaj Japanio sed ankaŭ aliaj interesitoj diligente aŭskultis prelegojn kaj raportojn faritajn de niaj kolegoj, kaj diskutis pri diversaj problemoj kaj malfacilaĵoj, kiujn azianoj ofte renkontas dum lernado de Esperanto.

Estas malfacila laboro trovi iujn efikajn metodojn de instruado de nia lingvo, kaj pro tio ni devas daŭre studi kaj evoluigi niajn instrukapablojn. Kiel azianoj, ni kunhavas konscion pri la problemoj kaj pri la graveco de la afero. Tial estas necese, ke ni kunsidu kaj diskutu por plibonigi la situacion. Mi kredas, ke ISOA tiusence estas taŭga loko por tio.

Ĉeftemo de ĉi-foja seminario estas “Esperanto-instruado en lernejo”. Mi bedaŭras, ke en Japanio tre malmultaj lernejoj havas lecionojn de Esperanto pro diversaj kialoj. Dum la seminario, mi volonte aŭskultos raportojn de du aliaj ILEI-sekcioj kaj penos ricevi iajn sugestojn kaj inspirojn.

La 4-an ISOA-n organizos ILEI-Japanio en 2014, kaj tiamaniere ni en Orienta Azio povas kunlabori por nia komuna celo, tio estas, ke ni kreu je la graveco de efika, alloga instruado de Esperanto kaj donu al homoj, precipe al junuloj, la okazon lerni Esperanton.

Mi esperas, ke la ĉeestantoj de tiu ĉi seminario povas plene ĝui la okazon kaj amikiĝi unu kun la alia en korea urbo Iksan.

**ISIKAWA Tiekō**

**Estro de japana sekcio de ILEI**



● Programo

21 (lun.)	15:00 ~ 16:00	Malferma ceremonio	<ol style="list-style-type: none"> <li>1. La Espero</li> <li>2. Saluto de filiestro de korea filio</li> <li>3. Saluto de filiestro de ĉina filio</li> <li>4. Saluto de filiestro de japana filio</li> <li>5. Salutmeŝaĝo de prez. de ILEI</li> <li>6. Salutoj de gastoj</li> <li>7. Klarigo pri programo</li> <li>8. Fermo</li> </ol>
		Memorfoto	
	16:00 ~ 17:00	Seminario-1 : MARKUS Gabor ⇨ p. 17	
	17:30 ~ 19:00	Vespermanĝo	
	19:00 ~ 20:00	Kunsido de estraranoj de tri landaj sekcioj	
	20:00 ~ 21:00	Seminario-2 : LEE Jungkee ⇨ p. 20	
21:00 ~ 22:00	Interkona vespero		
22 (mar.)	07:30 ~ 08:00	Matenmanĝo	
	09:00 ~ 12:00	<ul style="list-style-type: none"> <li>• Seminario-3 : SONG Ping ⇨ p. 26</li> <li>• Mi kaj 'mia biciklo' : XIONG Hui ⇨ 52</li> <li>• Seminario-4 : ISIKAWA Tieko ⇨ p. 27</li> </ul>	
	12:00 ~ 13:00	Tagmanĝo	
	14:00 ~ 17:00	<ul style="list-style-type: none"> <li>• Amuza lando de Esperanto : MA Youngtae ⇨ p. 50</li> <li>• Seminario-5 : GONG Xiaofeng ⇨ p. 32</li> </ul>	
	17:30 ~ 19:00	Vespermanĝo	
	19:00 ~ 22:00	<ul style="list-style-type: none"> <li>• Praktiko de Esperanto: Songanta</li> <li>• Seminario-6 : PARK Yongseung ⇨ p. 34</li> </ul>	
	22:00 ~	Libera babilado	
23 (mer.)	07:30 ~ 09:00	Matenmanĝo	
	09:00 ~ 12:00	<ul style="list-style-type: none"> <li>• Seminario-7 : YAMASITA Tosihiko ⇨ p. 37</li> <li>• Prezento de magio : OH Soonmo</li> <li>• Prezento de poemo : SONG Ping ⇨</li> <li>• Ĝenerala diskuto</li> </ul>	
	12:00 ~ 13:00	Tagmanĝo	
	13:00 ~	Duontaga ekskurso al la urbo Jeonju : Choi Eun-Suk ⇨ p. 7	
24 (ĵaŭ.)	07:30 ~ 08:00	Matenmanĝo	
	08:00 ~ 10:00	Pilgrimado en la sanktejo	
	10:00 ~ 12:00	Ferma ceremonio	
	12:00 ~ 13:00	Tagmanĝo kaj disiĝo	

● Duontaga ekskurso

## Jeonju, Urbo de Kulturo kaj Arto

Gvidanto / Choi Eun-Suk (Esti)

### Skiza Historio de Jeonju

#### Beakje<sup>1)</sup> kaj Jeonju<sup>2)</sup>

900 p.K. Gyeon Hwon<sup>3)</sup> okupis kaj fondis Hu-Beakje.<sup>4)</sup>

\*Beakje litere signifas ‘savi ĉiun popolon’.

935 p.K. Silla<sup>5)</sup> pereis. En sama jaro Gyeon Hwon(69-jaraĝa) anoncis, ke la kvara filo, Geumgang<sup>6)</sup> sekvis la regnon. La unua filo de Gyeon Hwon ribelis kontraŭ sia patro, enfermis lin en Geumsansa<sup>7)</sup>. Gyeon Hwon kapitulacis al Wang Geon<sup>8)</sup>, kaj gvidis Goryeo-armeon kontraŭ Hu-Beakje.

936 p.K. Hu-Beakje falis. Goryeo<sup>9)</sup> unuigis la tri reĝo-landojn.<sup>10)</sup>

#### Joseon<sup>11)</sup> kaj Jeonju

1250 p.K. Lee Ansa<sup>12)</sup> enamiĝis al gisengo<sup>13)</sup> apartenanta al ŝtata oficejo. Kiam la malĝusta afero riveliĝis, Ansa rifuĝis norden, kies parton regas mongoloj. Ansa submetis sin kaj regnaniĝis al Yuan<sup>14)</sup> kaj ekhavis oficialan postenon tie.

---

1) Beakje(백제, 百濟, a.K.18-p.K.660)

2) Jeonju(전주, 全州)

3) Gyeon Hwon(견훤, 甄萱, p.K.867~936)

4) Hu-Baekje(후백제, 後百濟, p.K.900-936)

5) Silla(신라, 新羅, a.K.57-p.K.935)

6) Geumgang(금강, 金剛)

7) Geumsansa(금산사, 金山寺)

8) Wang Geon(왕건, 王建, fondinto kaj la reĝo de Goryeo, p.K.877-943)

9) Goryeo(고려, 高麗, p.K.936-1392)

10) La tri reĝo-landoj; Hu-Goguryeo(後高句麗), Hu-Beakje(後百濟), Silla(新羅)

11) Joseon(조선, 朝鮮, p.K.1392-1910)

12) Lee Ansa(이안사, 李安社, ?-1274. Praavo de Lee Seong-gye)

13) Gisengo(기생, 官妓, artistino en antikva epoko kies laboro estis plezurigi la aliajn kiel nobelojn aŭ reĝojn.)

14) Yuan(원나라, 元朝)

Post ĉirkaŭ 100 jaroj, lia pranepo, Lee Jachun,<sup>15)</sup> returne submetis sin kaj regnaniĝis al Goryeo, sekve la norda parto apartenis al Goryeo. Li estas patro de Lee Seonggye,<sup>16)</sup> fondinto de Joseon.

1380 p.K. Lee Seonggye paŭzis kaj havis festenon ĉe Omokdae en Jeonju, revenvoje al Gaegyeong<sup>17)</sup> post kiam li venkis kaj forpelis japanan armeon, kiu invadis sudan parton de Goryeo.

1392 p.K. Lee Seonggye fondis Joseon. Lia familio devenis de Jeonju, sed li havis bedaŭron ke Jeonju forpelis lian praavon (malgraŭ ke la praavo mem ŝtele forkuris de Jeonju pro sia kulpo). Pro tio iama ĉefurbo, Jeonju degeneriĝis. Ankaŭ Jeonju ekhavis bedaŭron, tio naskis virtuozaĵajn kantistojn, kaj fariĝis lulilo de Pansori<sup>18)</sup>.

1410 p.K. la tria reĝo de Joseon konstruis palacon por konservi portreton de la fondinto, Gyeonggi Palaco, kies litera signifo estas 'domego konstruita sur feliĉa grundo'. Jeonju denove reprenis sian prestiĝon: unu el kvin ĉefaj urboj.

Poste, dum ĉ. 900 jaroj Jeonju daŭrigis trankvilan vivon. Kleruloj, erudiciuloj en Jeonju sin tenis je makgolio<sup>19)</sup>. Je makgolio oni ebriiĝas kvar fojojn; unue je ekscito, due je almanĝaĵoj, trie je bongusteco, laste je varma koro

### Regado de Japanio kaj Jeonju

1905 p.K. Protektorata Traktato inter Koreio kaj Japanio.

Japanoj ekloĝis en Jeonju unu post la alia, setlis laŭ la rivereto ekster Okcidenta Pordego, kies kvartalon originale okupis malnobeloj kaj komercistoj.



**Rizo-sakoj akumulitaj el diversaj lokoj en Honam Kamparo (湖南平野)**

1907 p.K. Japanoj konstruis vojon inter

Jeonju kaj Gunsan Haveno<sup>20)</sup> por elporti rizon al Japanio. Japanoj detruis kaj forigis murojn, kiuj ĉirkaŭis kaj protektis Jeonju, pretekste ke la muroj malhelpas transportadon de grajnoj.

**Varvagonoj de rizo-sakoj ĉe Gunsan Haveno**

15) Lee Jachun(이자춘, 李子春): Patro de Lee Seonggye(이성계, 李成桂, fondinto de Joseon)

16) Lee Seonggye(이성계, 李成桂, fondinto de Joseon)

17) Gaegyeong(개경, 開京, tiama ĉefurbo de Goryeo)

18) Pansori(판소리, tradicia korea stilo de rakonta kanto)

19) Makgolio(막걸리, vino el rizo)

20) Gunsan Haveno(군산항, 群山港)



La malnova sekcio de la urbo Jeonju de la 1920-aj jaroj

Japanoj eniris en urbocentron kaj ekkomercis.

La komunumaj gvidantoj faris interkonsenton, ke oni devu protekti Kyodong<sup>21)</sup> kontraŭ okupado de japanoj. Do ili ariĝis en Kyodong-n kaj klopodis konservi koreajn tradiciojn inkluzive de konstruado de loĝejo, manĝaĵoj, artoj, k.t.p.

## Nun

Jeonju estas ĉefurbo de la provinco Norda Jeolla.

Ĝeneraloj pri Jeonju: areo 206.22km<sup>2</sup>, averaĝa temperaturo 13.3°C, ĉiujara pluvokvanto 1313.1mm, loĝantaro 653,370 (Apr. 2012).

Unu tagon en Jeonju, naskiĝas 15.4 beboj, forpasas 7.8 personoj, geedziĝas 5 paroj, disiĝas 3.6 paroj, ĉiu forĵetas 0.95kg da rubo, ĉiu uzas 389 literojn da kranakvo, forlasas 355.9 personoj el Jeonju kaj enloĝiĝas 343.4 personoj en Jeonju.

## Jeonju Hanok Vilaĝo<sup>22)</sup>

1977 La urbo deklaris la distrikton de Kyodong kaj Pungnamdong<sup>23)</sup> kiel Hanok-Vilaĝon.

1987 La urbo starigis regulon difini la Vilaĝon kiel estetikan zonon. Tio signifas, ke nur tradiciaj konstruaĵoj estas permesotaj en la distrikto. La regulo elvokis fortan kontraŭstaron, tial ke oni ne povis memdisponi sian rajton je posedaĵoj.

1997 Nuliĝis la regulo.

2002 La urbo starigis alian regulon por konservi Hanok-n<sup>24)</sup>, ke la urbo subvencios nove konstruotajn aŭ renovigotajn domojn.

2010 Jeonju Hanok Vilaĝo fariĝas Internacia Malrapida Urbo.

2013 La vilaĝo larĝa je 296,330m<sup>2</sup> havas 708 domojn (la tradicia 543, kaj aliaj 165) kaj 2,202 loĝantaron.

21) Kyodong(전주시 교동, 全州市 校洞, Nun la distrikto estas Jeonju Hanok Vilaĝo)

22) Jeonju Hanok Vilaĝo(전주 한옥마을, 全州 韓屋村)

23) Pungnamdong(전주시 풍남동, 全州市 豊南洞, Nun la distrikto estas Jeonju Hanok Vilaĝo)


24) Hanok(한옥, 韓屋, korea tradicia domo)

Kio kaj Kio en Jeonju Hanok Vilaĝo: speciala loko por trovi 'Kiu Mi Estas!'


*Muroj, Aleoj kaj Pordoj*



*Fenestroj, Tegmentoj el tegoloj kaj Tegmentorandoj*



*Potara Teraso, Akvovojo kaj arboj*



## Vidindaĵoj en Jeonju Hanok Vilaĝo

### *Choi Myeonghui Literatura Muzeo*<sup>25)</sup>



La novelo "Honbul(fajro de animo)" de Choi Myeonghui estas laŭdata laŭ la plialtigo de la nivelo de korea literaturo. En la novelo la aŭtorino priskribis historion kaj spiriton de koreoj per belega korea lingvo. Ŝi naskiĝis en Jeonju.

La muzeo ekspozicias ŝiajn manuskriptojn kaj maneskribitajn leterojn al ŝia amikino. La muzeo fondiĝis por konservi ŝiajn postlasaĵojn kaj verkaĵojn, studi la tradicion kulturon tra historio de homoj, kaj promocii interŝanĝon de kulturoj inter landoj.

25) Choi Myeonghui Literatura Muzeo(최명희 문학관, 作家 崔明嬉 文學館)

### *Gyeonggijeon*<sup>26)</sup>



Gyeonggijeon estas palaco por sanktigi la fondinton de Joseon, la unua reĝo Taejo(太祖), kaj elmetas la portreton de Taejo. La palaco estis konstruita en 1410, forbruligita en 1597 dum japana invado, kaj en 1614 rekonstruita. En Joseon epoko estis kvin arkivoj tra tuta lando. Unu el ili estis en Gyeonggijeon. Dum japana invado aliaj kvar arkivoj estis forbruligitaj de japanoj, escepte tiun en Jeonju-Gyeonggijeon, Tio signifas, ke nur Jeonju sekure protektis la arkivon. La palaco havas belegan ĝardenon kun centjaraj ginkoj, zelkovo kaj bambuoj k.t.p.

### *Hanbang(orienta medicino) Kultura Centro*<sup>27)</sup>



Hanbang Kultura Centro estas nura orienta medicina muzeo, kiu konektas la orientan medicinon al korea tradicia vivo-stilo. Vizitantoj povas sperti la medicinon ĉi tie.

Ekzemple oni povas kontroli sian konstitucion kaj korpan sanstaton en la orienta maniero. Piedmasaĝo en varma akvo miksitita kun orienta medicino donos al via laca korpo refreŝecon.

### *Jeondong Katedralo*<sup>28)</sup>



En 1791(Reĝo Jeongjo 15), la unuaj martiroj en Koreio, Paulo(Yun Jichung) kaj Jakobo(Gwon Sang-yeon), estis persekutitaj kaj ekzekutitaj. Post dek jaroj la unuaj apostoloj, Augustine(Yu Hanggeom), Francesco(Yun Jiheon), kaj aliaj ankaŭ martiriĝis ĉi tie. Por honorigi la martirojn, la franca pastro Baudenet aĉetis la terenon makulitan per sango de martiroj, en 1891 komencis konstruadon de la preĝejo kaj finis en 1914.

26) Gyeonggijeon(경기전, 慶基殿)

27) Hanbang(orienta medicino) Kultura Centro(한방문화센터, 韓方文化中心)

28) Jeondong Katedralo(전동성당, 殿洞聖堂)

*Omokdae kaj Imokdae*<sup>29)</sup>



La du lokoj estas signifoplenaj je deveno kaj komenco de Joseon Dinastio. Prapatro de Lee Seonggye (la fondinto de Joseon) naskiĝis tie, kie nun staras Imokdae. Kvin generaciojn poste, en la jaro 1380, la posteulo, Lee Seonggye, tiama generalo de Goryeo, havis festenon por mem gratulian venkon kontraŭ japana armeo. Por memori tion oni starigis la pavilonon, Omokdae. El Omokdae oni povas rigardi la panoramon de Jeonju Hanok Vilaĝo.

*Pungnammun*<sup>30)</sup>



Pungnammun, la suda pordego de fortreso kiu ĉirkaŭis Jeonju. Ĝi troviĝas inter Jeonju Hanok Vilaĝo kaj Nambu-Bazaro. En la lasta tempo la urbo renovigis la Pordegon kaj ŝanĝis la tegolan tegmenton.

*Jeonju Gaeksa*<sup>31)</sup>



Dum Goryeo Dinastio, Gaeksa estis konstruita en ĉiu vilaĝo kaj uzita kiel tranoktejo aŭ festenejo por fremdlandaj gastoj. Dum Joseon Dinastio, ili estis uzita kiel religia celo. Tie oni lokumis prapatrajn tabelojn kaj faris tradiciajn ritojn.

Nun Jeonju Gaeksa estas unu el plej amataj lokoj de Jeonju-civitanoj.

29) Omokdae(오목대, 梧木臺), Imokdae(이목대, 梨木臺)

30) Pungnammun(풍남문, 豐南門, Pungnam Suda Pordego)

31) Jeonju Gaeksa(전주객사, 全州客舍)



### *Filmo Strato*<sup>32)</sup>



Ĉiujare Jeonju Internacia Film-Festivalo okazas en Filmo Strato (Cinema Street). Ĉe Filmo Strato troviĝas la granda plimulto de kinejoj en Jeonju kaj svarmas gejunuloj! Sur vojoj pavimitaj el helaj koloroj la emblemo de la filmo-festivalo estas surprisita. Laŭ la strato troviĝas bonaj kaj ne multekostaj restoracioj.

### *Jeonju Nambu Bazaro*<sup>33)</sup>



Jeonju Nambu Bazaro havas longan historion. En Joseon epoko estis kvin bazaroj en Jeonju, unu en la kastelo kaj kvar ekster la kastelo. Jeonju Nambu Bazaro estis unu el la kvar bazaroj (orienta, okcidenteata, suda, kaj norda). 'Nambu(南部)' signifas sudan parton, t.e. Nambu Bazaro estas ekster suda pordego.

En sia ora epoko Jeonju Nambu Bazaro estis tiel prospera, ke la bazaro decidis prezon de rizo, kaj ke komercistoj el grandaj urboj kiel Busan aŭ Masan kolektiĝis por aĉeti varojn.

Nun arigas ĉirkaŭ 790 vendejoj kaj pli ol 1,200 komercistoj en la bazaro, kies komercaĵoj estas diversaj ŝtofoj, mebloj, sekigitaj fiŝoj, legomoj, fruktoj, k.t.p. Kaj ankaŭ troviĝas modestaj manĝejoj, kies malkaraj manĝaĵoj servas unikan bongustecon al gastoj.

### *Tradicia Alkoholaĵo-Muzeo*

La muzeo malfermiĝis en Jeonju Hanok Vilaĝo en 2002 por heredi la tradicion de hejm-farita likvoro, kiu estis servita al gastoj aŭ uzita por ritoj rilataj de prapatroj. La muzeo ekspozicias procezon fari likvoron, ilojn kaj ankaŭ diversajn tradiciajn likvorojn, famajn kaj tutlandajn.

32) Filmo Strato(영화의 거리)

33) Jeonju Nambu Bazaro(전주남부시장, 全州 南部市場)



# **Seminario de la 3a ISOA**

● Seminario – 1

## La utileco de Esperanto en mia profesia kariero

– Kiel ni inspiru kaj instigu niajn lernantojn por pli efika lingvolernado? –

D-ro MÁRKUS Gábor

Laŭ multcentjara sperto instruado estas la plej efika metodo por evoluigo de socia kaj ekonomia vivo. En Guan Zi, la fama ĉina verko legeblas tiu vivsaĝeco jene:



警世恒言：“如果你作一年计划，请你播种！  
如果你作十年计划，请你植树！  
如果你作百年计划，请你育人！  
如果你播种，你只能收一次谷。  
如果你植树，你就可采十年果。  
如果你育人，你就可百获其益。

管子”

“Se vi planas por unu jaro, ĵetu semon!  
Se vi planas por dek jaroj, plantu arbon!  
Se vi planas por cent jaroj, instru la  
popolon!  
Se vi ĵetas semon, vi rikoltos unufoje.  
Se vi plantas arbon, vi rikoltos dekfoje.  
Se vi instruas la popolon, vi rikoltos  
centfoje.”

En nia epoko, en la dudeka kaj dudekunua jarcentoj la instruado kaj speciale la lingvoinstruado havas eĉ pli gravan rolon en la socio, ol antaŭe. La kialo estas komprenebla: la internaciaj sciencaj, kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj estas pli vastaj kaj profundaj, ol ili estis en la antaŭaj jarcentoj. Mi vivas en malgranda eŭropa lando en Hungario. Mia lando apartenas al la Eŭropa Unio, kie 23 oficialaj lingvoj estas uzataj. Kompreneble en la centraj oficejoj de la eŭropa komunumo oni tre malofte uzas ĉiujn oficialajn lingvojn, sed por facile komunikiĝi necesas kompreni kaj paroli almenaŭ unu aŭ du mondlingvojn. Antaŭ la milito la franca lingvo estis devige uzata en multaj internaciaj organizoj, nuntempe oni plej ofte uzas

la anglan lingvon en Eŭropo, same kiel en la tuta mondo. Dum la komunisma epoko la rusa lingvo estis instruata en la orienteŭropaj lernejoj, nuntempe la angla, sed en Hungario ankaŭ la germana, ĉar multaj entreprenoj, bankoj, ktp. apartenas al germanaj firmaoj en mia lando.

En tiu situacio la lernantoj kaj ankaŭ la gepatroj de la lernantoj havas dilemon: "kiun lingvon oni lernu private aŭ oficiale en la mezlernejoj kaj la universitatoj?". La Esperanto-instruistoj malfacile povas konvinki la lernantojn kaj la gepatrojn de la lernantoj, ke ankaŭ la lernado de la internacia lingvo estas utila. Multaj homoj opinias, ke la lingvoscio de la angla, la germana, aŭ la ĉina lingvoj havas rektan avantaĝon, sed la lernado de la internacia lingvo estas nur unika amuziĝo aŭ tempopasigo. En mia prelego mi intencas klarigi, ke la lernado de Esperanto en mia profesia kariero estis pli utila ol la lernado de multaj aliaj lingvoj, kvankam mi devis lerni en diversaj lernejoj ankaŭ la latinan, la germanan, la francan, la anglan kaj ankaŭ la japanan lingvojn.

Laŭ leĝo en Hungario la studentoj ne rajtas ricevi universitatan diplomon, se ili ne kapablas sukcese fari ŝtatan lingvoekzamenon. Pro tio dekmiloj da studentoj lernas Esperanton dum ĉiuj jaroj, ĉar estas konate, ke ellerni tiun lingvon estas pli facile, ol ellerni multajn aliajn naciajn lingvojn. Laŭ scienca analizo oni konkludis, ke la lernantoj de la internacia lingvo povis sukcese fari la lingvoekzamenon post 300 hora lernado. En kazo de la angla lingvo 3000 hora lingvolernado estas bezonata. Kiam oni akceptis tiun leĝon en la parlamentejo, aŭ en la registaro, tiam oni efike stimulis, kuraĝigis kaj spronis la instruadon de la internacia lingvo en Hungario.

Alia metodo por stimuli, kuraĝigi kaj sproni la lingvolernadon estas la speciala salajrosistemo, kiu donas avantaĝon al la homoj, kiuj havas dokumenton de sukcesa oficiala ŝtata lingvoekzameno. Laŭ leĝo tiu kromsalajro povas esti signifa kaj grava en Hungario, mi persone ricevis inter 5 kaj 10 milionoj da ŝonoj(won) tiamaniere, kiel kromsalajro. Laŭ leĝo la estro de la oficejo, aŭ entrepreno rajtas decidi, ĉu oni donas aŭ ne donas tiun kromsalajron al la dungitoj. La vidpunkto de la decido rilatas al la utileco de la lingvo. Se iu homo havas lingvoekzamenon de latina aŭ sanskrita lingvo, la estro de financa, komerca, aŭ industria organizo povas konkludi, ke tiu lingvo ne estas utila por la agado de la dunganta organizo. En tiu kazo oni povas decidi, ke oni ne donas kromsalajron. Sed povas okazi, ke en alia organizo, ekzemple en muzeo, aŭ en biblioteko, oni opinias, ke la lingvoscio de tiuj lingvoj estas utila, ĉar multaj dokumentoj en tiu muzeo, aŭ biblioteko estas skribitaj en tiuj lingvoj. En tiu kazo la estro rajtas decidi, ke oni pagas tiun kromsalajron al la dungitoj.

Nuntempe multaj homoj erare opinias, ke la internacia lingvo ne estas taŭga lingvo por diskuti seriozajn sciencajn aŭ fakajn problemojn. Pro tio multaj lernantoj kaj la gepatroj de la lernantoj emas elekti naciajn lingvojn, ĉar ili supozas, ke tiamaniere ili havos avantaĝojn post kelkaj lingvolernado. En la prelego mi intencas montri, ke mi efike povis uzi la internacian lingvon en mia profesia kaj faka agado. Mi ricevis eblecon studi en japana

universitato per Esperanto—stipendio kaj mi povis doktoriĝi tiamaniere pri la analizo de la japana ekonomia evoluo. Poste mi partoprenis multegajn sciencajn kaj fakajn konferencojn en multaj landoj de Eŭropo, Azio kaj Ameriko, kie krom la angla, rusa kaj germana lingvoj mi efike povis uzi ankaŭ la internacian lingvon. Pri miaj fakaj spertoj mi verkis pli ol 150 librojn kaj artikolojn, kiuj aperis krom diversaj naciaj lingvoj ankaŭ en la internacia lingvo. Tiamaniere mi ĉiam povis konvinki miajn estrojn, ke la internacia lingvo estas utila kaj por mi kaj por mia laborejo. Pro tio mi ĉiam ricevis oficialan kromsalajron de miaj laborejoj, ĉar la estraro klare vidis, ke mi ne nur ellernis la lingvon, sed mi ĉiam ankaŭ efike uzas ĝin en miaj internaciaj kontaktoj. Mia konkludo estas, ke se ni intencas disvastigi la instruadon de la internacia lingvo, tiam nepre necesas montri la utilecon de la lingvo kaj ankaŭ ties aplikeblecon en la internaciaj sciencaj, kulturaj, komercaj kaj ekonomiaj rilatoj. La lernantoj devas kompreni, ke estas kazoj, kiam Esperanto estas pli efike uzebla lingvo, ol la tielnomataj mondlingvoj, kiujn oni vaste instruas en ĉiuj landoj de la mondo. ☞

### —Biografio—

MÁRKUS Gábor naskiĝis en 1948 en Hungario. Finis la studprogramon de la Budapeŝta Ekonomiko—scienca Universitato en 1972 en la kampo de planado kaj matematiko. Dum la sekvontaj jaroj instruis matematikon en la sama universitato. En 1982 ricevis stipendion de japana Entrepreno Verda Stelo por studi en Nanzan Universitato en mezjapana urbo Nagoya.

Post la sukcesa fino de sia studprogramo li doktoriĝis pri la analizo de la japana ekonomia evoluo. En la naŭdekaj jaroj li fariĝis strategia manaĝero de la plej granda hungara industria organizo Nacia Petrola Korporacio. Por konatiĝi kun la internacie uzataj plej modernaj entrepreno—direktaj metodoj en 1993 li sukcese finis studprogramon en la urbo Boston, Massachusetts, Usono. Kiam la orient—eŭropaj landoj decidis aliĝi al la eŭropa komunumo, tiam li estiĝis estro de la hungara parlamenta kontrolo kaj aŭditororganizo havante du taskojn: kontroli la registaron kaj evoluigi la publikan administran sistemon por ke la lando povu aliĝi al la Eŭropa Unio.

Li estas verkinto de pli ol 150 libroj kaj artikoloj en diversaj lingvoj, la ĉefverkoj estas: 『Perkomputilaj entrepreno—direktaj metodoj』 (eldonis lia universitato en 1974), 『Internacia kunlaboro en la publika administrado』 (eldonis la hungara Ĉefministra Oficejo en 1995), 『Financa kontrolo kaj aŭdito en la Eŭropa Unio』 (eldonis la Financa Ministrejo en 1994), 『Ruĝa suno kaj verda stelo』 (originale aperis en Esperanto en 2011, poste eldonis ankaŭ en la hungara kun la titolo “Vörös nap és zöld csillag”, kaj ankaŭ japane kun la titolo “赤い太陽と緑の星”), 『Trans la Falava mar』 (originale aperis en Esperanto en 2012, poste oni eldonis ankaŭ en la korea kun la titolo “황해를 넘어서”), 『Sudorientaziaj Vojaĝoj』 (originale aperis en Esperanto, poste oni eldonis ankaŭ en ĉina lingvo kun la titolo “东南亚之旅”). ☞

● Seminario – 2

## Universitata Esperanto-edukado en Koreio


LEE Jungkee / Estro de korea sekcio de ILEI





1. Kiuj universitatoj
  - 1) Univ. Dankook
  - 2) Univ. Wonkwang
  - 3) Univ. Korea Fremdlingva
  - 4) Univ. Kyunghee
2. Instruo-metodo
  - 1) Renkontiĝo kun alilandanoj
  - 2) Per Skajpo
  - 3) Per Fejsbuko
  - 4) Simpla kaj Ripetado
3. Pritakso de kurso-rezulto
  - 1) Dufojaj ekzamenoj
  - 2) Raportaĵo pri Zamenhof
  - 3) Atestilo
4. Enketilo
5. Konklude

### Enketilo pri Esperanto


(32 gestudentoj de Univ. Kyunghee)









### Kia estas instrumetodo de via instruisto?



### Ĉu Esperanto-lernado helpos al via alilingva lernado?



### Kia estas literatura esprimo de Esperanto?




### Ĉu vi ŝanĝis vian vidpunkton al internacia lingvo lerninte Esperanton?




## Kian impreson vi havis renkontinte alilandajn esperantistojn en la klaso?



## Kion vi faros post baza kurso?





## Konklude

- Esperanto estas lerninda lingvo, sed reale per Esperanto studentoj ne povas trovi laborejon.
- Lasu bonan impreson pri Esperanto kaj ni rikoltu iam poste.
- Ni devas klopodi enigi Esperanto-lecionon en universitaton.
- Ni devas cerbumi kiel kreskigi kurso-gvidanton por univ.-kurso.

● Seminario – 3

## La junulaj movadoj de Esperanto en Heilongjiang Provinco, Ĉinio

Prof. SONG Ping (Paco)



1. Rekomendi ĉefajn seminariojn de la 1-a ĝis la 4-a Junulaj Seminarioj de Esperanto en Harbino, Ĉinio. (2009~2012).
2. Ĉiujare ni starigis ABC-Kursojn de Esperanto kaj mezgradajn kursojn en Harbino. Ĝis nun ni jam starigis 20 ABC-Kursojn kaj 8 mezgradajn kursojn de Esperanto en Harbino.
3. Ni kulturis 10 bonegajn junulajn esperantistojn.  
Probable 400 studentoj lernis Esperanton (2008~2012).
4. Ni akceptis kaj invitis kelkajn fremdajn esperantistojn alveni al Harbino por instrui Esperanton.

● Seminario – 4

## Esperanto-Instruado en japanaj lernejoj

ISIKAWA Tiekō / Estro de japana sekcio de ILEI



Ĉi tie mi parolas pri aktuala stato de Esperanto-instruado en japanaj lernejoj kun iom da historio kaj pri problemoj, kiujn ni havas. La vorto “lernejo” ĉi tie signifas ĉefe mezlernejon (kun lernantoj 12–15 jaraj), supermezlernejon (kun lernantoj 15–18 jaraj) kaj universitatojn. Elementan lernejon mi esceptas el la ekzemploj, ĉar preskaŭ neniam okazis Esperanto-instruado tie krom muzikaj lecionoj, dum kiuj lernantoj kantis kelkajn esperantajn kantojn aparte gvidite de iu eksinstruisto esperantista.

### 1. Nuna stato (dum la lastaj kelkaj jaroj)

– Kie oni instruas Esperanton? –

- Universitatoj: Ibaraki Universitato, Saitama Universitato, Tokia Universitato, Tokia Universitato de Teknologio, Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj, Osaka Universitato, Kyusyu Universitato, ktp. (ĉiuj estas ŝtataj universitatoj)
- Supermezlernejoj: Ikeda-kita Supermezlernejo(2004–2013?) Nippa Supermezlernejo(1998–2011)
- Mezlernejoj: Nisisiba Mezlernejo, Oume Daiichi Mezlernejo, Mezlernejo de Saitama Universitato, ktp.

– Ĉu oni instruas Esperanton kiel lingvolernadon? –

En universitatoj, studentoj lernas Esperanton kiel unu el aliaj lingvoj krom la angla, kiu estas deviga. Multokaze lecionoj okazas unufoje samajne dum 90 minutoj unusemestre kun 2 studpoentoj. Sed plejparte tiuj lecionoj estas unu el ĝeneralaj studobjektoj kaj ŝajnas, ke studentoj ne tiom interesiĝas pri la lingvo mem. Unu escepto estas 20~30hora intensiva kurso

en Fakultato de Fremdaj Lingvoj de Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj. Tie studentoj studas Esperanton kiel specialan studon pri lingvistiko.

En la du supremenciitaj supermezlernejoj, Esperanto-leciono estas oficiala kaj unu el elekteblaj lernoobjektoj en la tria lernojarlo. En Nippa Supermezlernejo lernantoj lernis Esperanton dum la tuta jaro kaj ekzameniĝis same kiel aliaj lernoobjektoj. Situacio en Ikeda-kita estas iomete malsama; tie lernantoj lernas Esperanton paralele kun unu alia fremdlingvo, el la ĉina aŭ la korea dum duonjaro. La nomo de la kurso estas "Internacia Komprenado" kaj oni lernas tiujn lingvojn kiel helpilojn por kompreni aliajn homojn kaj kulturojn.

Se temas pri mezlernejoj, malofte okazas Esperanto-leciono pli ol dek-horaj. Tri supremenciitaj mezlernejoj estas esceptaj sed restas la kurso nur en Nisisiba Mezlernejo nun. Okazis/okazas en multaj mezlernejoj tiel nomataj "provizora"j lecionoj de Esperanto, kiuj donis al la lernantoj nur skizon de nia lingvo.

#### **– Kiuj instruas Esperanton en tiuj lernejoj? –**

Ĝenerale instruisto-esperantistoj de koncernataj universitatoj aŭ supermezlernejoj instruas la lingvon, sed ofte okazas, precipe en universitatoj, ke instruistoj de aliaj universitatoj havas kurson tie. Ekzemple s-ro SASAKI Teruhiro, kiu nun instruas en iu ĉina universitato, instruis en kelkaj universitatoj paralele. En Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj instruas s-ro GOTOO Hitosi, kiu mem estas profesoro de Tohoku Universitato en la urbo Sendai.

En mezlernejoj plejparte instruas lokaj esperantistoj, kiuj ne estas profesiaj instruistoj.

## **2. Historio de Esperanto-leciono en japanaj lernejoj**

Japanio havas pli ol centjaran historion de Esperanto kaj certe ekzistas interesaj epizodoj pri Esperanto-leciono en fruaj jaroj, sed ĉi tie mi parolos nur pri la historio post la fino de la 20-a jarcento, precipe enfokusigante mez- kaj supermezlernejojn.

#### **– Kio ebligis enkondukon de Esperanto al mez- kaj supermezlernejoj? –**

En 1998, Ministerio de Edukado, Sciencoj kaj Kulturo reviziis normon pri edukprogramo, kaj decidis enkonduki al ĉiu lernejo tiel nomatan "sinteza lernado".

"Internacia Komprenado" estis unu el la ĉefaj temoj montritaj de la ministerio por tiu lernohoroj. Multaj esperantistoj tra Japanio kaptis tiun okazon kaj vizitis lernejojn por portempa, multokaze nur unufoja leciono pri Esperanto. Sed en kelkaj mezlernejoj, kiujn mi menciis supre, okazis regula leciono kun pli da lernohoroj. Por plenumi tiun novan lecionon mankas instruistoj, ĉar ĝistiamaj ordinaraj instruistoj ne kapablas gvidi tiajn temojn, kiaj traktas preskaŭ ĉiuspecan temon. Pro tio lernejoj petis helpon al najbaraj loĝantoj, kaj

esperantistoj ĝoje utiligis la okazon.

Situacio en supermezlernejoj estas iom malsimila. La reformado de studprogramo surbaze de la nova normo ebligis al unuopa lernejo enkondukon de Esperanto. Lernejoj povas aldoni Esperanto-lecionon, se troviĝas taŭga instruisto kaj tiu lecionoplano estos akceptita kiel ordinara lernoobjekto.

**– Ŝanĝo de edukprogramo – postulo de lernado de la angla –**

Kiel en aliaj landoj, kun la evoluo de tutmondiĝo, postulo de lernado de la angla lingvo fortiĝas, kaj ĉiuj volas lernigi nur la anglan al lernantoj kaj studentoj. En Japanio, fremdlingva lernado signifas nur anglalingvan lernadon. En tia situacio denove okazis iom da ŝanĝo de studprogramo, kaj plimalmultiĝas lernoĥoroj de “sinteza lernado”, kio signifas, ke Esperanto perdas ŝancon montriĝi en lernejoj.

### 3. Problemoj

**– Lernejoj sistemoj, kiuj obstrukcias la enkondukon de Esperanto –**

En Japanio lerneja sistemo estas relative rigida kaj forte administrita de la registaro. En publikaj lernejoj ĝenerale instruistoj ne povas resti en unu lernejo pli ol 10 jarojn; tio iom dependas de unuopaj lernejoj, sed pro tiu regulo, instruisto kiu sukcese havis Esperanto-lecionon jam ne povas daŭrigi ĝin. Eĉ se tiu instruis kapablas instrui Esperanton, sen konsento de aliaj instruistoj kaj permeso de lernejestro, tiu ne povas havi Esperanto-lecionon en nova lernejo.

Multe pli malfacile estas enkonduki alian lernoobjekton ol ordinarajn lernoobjektojn. Preskaŭ neniu instruisto krom esperantisto-instruistoj ne scias lernofaciligan efekton (propedeŭtikan efekton) de Esperanto, kaj en multaj lernejoj instruistoj lernigas al lernantoj, por ke ili povu eniri famajn universitatojn/supermezlernejojn. Lernejestroj havas grandan aŭtoritaton kaj ordinaraj instruistoj preskaŭ ne havas liberecon elekti lernoobjektojn. Tio, kion esperantisto-instruistoj povas fari, estas nur mallonge paroli pri Esperanto en sia propra leciono de ekz. matematiko, scienco, ks. Sed kvankam tio estis tre malofta okazo, okazis mala afero. Temas pri la Mezlernejo de Saitama Universitato, kie mi mem instruis Esperanton al ĉirkaŭ 40 lernantoj en la unua kaj dua lernoĵaroj dum tri monatoj. La lernejestro de tiu lernejo estis amiko de s-ro SASAKI Teruhiro, kaj tiam li estis en la lasta jaro de sia oficperiodo. Li multfoje aŭdis de s-ro SASAKI pri Esperanto, kaj fine decidis proponi Esperanto-lecionon kadre de “sinteza lernado”. Tre feliĉe la propono estis akceptita de instruistoj, verŝajne instruistoj lasis lin fari, kion li volis ĵus antaŭ lia emeritiĝo. Laŭ mia kompreno, tiu ĉi okazo estis ege malofta. Grava fakto estas, ke tiu mezlernejo apartenas al la fakultato de Saitama



Universitato, ŝtata universitato, kaj ĝi havas iusence liberan edukpolitikon, kiun aliaj publikaj lernejoj ne havas.

– **Manko de bonaj lernolibroj kaj materialoj** –

Tio dependas de tio, ĉu la leciono celas lingvolernadon, kiom da lernohoroj, aŭ kiaj lernantoj, tamen ni ankoraŭ ne havas lernolibrojn faritajn precipe por lernantoj. S-ino Kitagawa Ikuko, kiu unuafoje instruis Esperanton en Nippa Supermezlernejo en 1998, uzis lernolibron “Ludu kun Ni” eldonitan en Italio dum kelkaj jaroj. Tiu libro, kiel vi imagas, estas por infanoj, nome eŭropaj infanoj. La enhavo kaj la nivelo tamen ne estas malalta por japanaj 17~18-jaraĝuloj, sed la libro kostis multe. Ŝia sekvanto, s-ro Kitagawa Hisasi mem faris lernomaterialojn kaj instruis Esperanton ĝis 2011. Daŭris Esperanto-lecionoj en tiu lernejo dum 14 jaroj.

Kiam mi instruis Esperanton en Mezlernejo de Saitama Universitato, mi uzis la libron “Esperanto per Rekta Metodo”, japanan version.

Se temas pri universitatoj, s-ro Sasaki ĉiam uzis memfaritan materialon “Rapidstudo de Esperanto”, kaj post kelkhora lernado de baza gramatiko, studentoj legis iun Esperanto-version de famaj literaturaĵoj kiel rakontoj de Andersen. Mi ne bone scias, kiajn lernolibrojn aliaj instruistoj uzis kaj uzas en siaj kursoj.

Por kompletigi mankon de lernolibroj, nun vaste troviĝas rete bonaj materialoj, kaj mi kredas, ke instruistoj utiligas ne nur ilin sed ankaŭ vizitojn de alilandaj gastoj.

– **Manko de instruistoj** –

En Japanio esperantistoj malmultiĝas, ankaŭ instruistoj-esperantistoj. La plej grandan proporcion okupas esperantistoj pli aĝaj ol 60 en japana Esperantujo, kaj estas malmultaj junuloj, kion vi jam vidis dum diversaj esperantaj aranĝoj. Sub nuna edukstemo, tre malfacilas okazigi Esperanto-kurson kun eksterlernejaj esperantistoj. Kaj, eĉ se venus peto okazigi Esperanto-lecionon en iuj lernejoj, mi dubas ĉu ni povas ĝuste respondi al tia peto kun sfuiĉe kapablaj instruistoj.

#### 4. Perspektivo

– **Ĉu eblas plimultigi Esperanto-lecionojn en lernejoj?** –

Kiel mi jam parolis, en nuna situacio ŝajnas, ke ne. De tempo al tempo ni aŭdas, ke en iu lernejo iu esperantisto parolis pri Esperanto al lernantoj, sed plejparte tio okazis nur por la limigita lernohoro, tute portempa. Interesa sed bedaŭrinda fakto estas, ke instruistoj de la angla ofte montras malŝaton al Esperanto. Ili ne scias, kio estas Esperanto kaj kian efekton ĝi havas. Malfeliĉaj estas japanaj lernantoj. Eĉ la anglan ili ne povas bone paroli spite de

alpremita lernado de la angla. Kvankam forta estas la premo de anglalernado, troviĝas kelkaj lernejoj, kie oni instruas aliajn lingvojn kiel la ĉinan kaj la korean kiel la trian lingvon. Estas bezonate, ke instruistoj mem fariĝos pli malfermitanimaj kaj esploros la efikon kaj manieron de preferinda lingvoinstruado. Al mi ŝajnas, ke ĝisnunaj manieroj de lingvoinstruado en lernejoj alportis nenian frukton: Japanio estas jam longtempe klasifikita je la plej malalta rango de poentoj de TOEFL (Testo de la angla kiel fremdlingvo) ekzamenitoj.

**– Ĉu helpas sukcesaj ekzemploj en Ĉinio kaj Koreio? –**

Certe jes, tamen ankoraŭ mankas sukcesaj modeloj. Mi havis okazon viziti bazan lernejon en la urbo Taiyuan, Ĉinio, kie daŭras eksperimento pri la efiko de Esperanto-lernado anticipa ol la komenco de angla-lernado. S-ro Jado, estro de tiu lernejo, jam havis bonan rezulton de tiu eksperimento, kaj ni atendas post la unua sesjara eksperimento iun perfektan raporton pri la projekto. Mi kredas, ke la raporto havos certan boninfluan ankaŭ en nia lando.

Alia bona modelo estas Esperanto-instruado de Songanta en Koreio. La lernejo, kie ŝi instruas, estas unu el alternativaj lernejoj, pro tio ni ne povas facile kompari la aferojn. Sed kun sukcesa ekzemplo ni povas montri al la socio unu elektelecon de lingvolernado. Ankaŭ en Japanio estas multaj alternativaj lernejoj, sed en multaj tiuj lernejoj ŝajne ne troviĝas loko por Esperanto: tie homoj pensas, ke fremdlingvo signifas la anglan, kaj krome ne estas instruisto-esperantisto. La lastan oktobron ni kontaktis unu el la plej malnovaj, famaj alternativaj lernejoj en Tokio proponinte prelegeton pri Esperanto. Ni pensis, ke ni povas paroli pri la aktivado de Songanta kaj ŝiaj lernantoj, kaj ke lernantoj montrus intereson pri Esperanto, kiun preskaŭ neniu scias. Bedaŭrinde eĉ nun ni ricevis neniun reagon de ili.

**– Kion povas fari ILEI-JP? –**

Ĉe la restarto de ILEI-JP en 2010, ni lanĉis du ĉefajn celojn: instrui Esperanton kaj plimulti instruistojn kaj instruantojn de Esperanto. En tiu edukkampoj, ni subtenas, instigas kaj helpas, se necese, membrojn de nia sekcio, kaj ofte eĉ nemembrojn.

En nia sekcio nun estas 28 personoj, el ili kvar estas instruistoj kaj kelkaj estas eksinstruistoj. Kiel movada organizo, ni estas malgranda kaj malforta pro diversaj kialoj, pri kiuj mi jam parolis, malfacilas subite ekkonigi la ekziston kaj valoron de Esperanto al homoj en eduka kampo kaj enkonduki Esperanton en lernejojn. Ni tamen povas kapti ĉiujn okazojn, kiuj povus helpi nian agadon. Utiligi la fadenon de instruistoj estas unu afero, kaj ILEI-JP planas okazigi iun kunsidon dum la 100-a Japana Esperanto-Kongreso en Tokio, en oktobro ĉi-jare, en kiu ni montrus al neesperantistaj instruistoj nunan bildon de Esperanto, kaj espereble donos al ili motivon pripensi ion alian ol ili ĝis nun scias. ☸

● Seminario – 5

## Komunaj problemoj pri Esperanto-instruado/lernado en ĉinaj altlernejoj

GONG Xiaofeng / Estro de ĉina sekcio de ILEI



### [Resumo]

Esperanto-instruado estas baza laboro por propagandi kaj disvolvi Esperanton, ĝi ankaŭ estas la nemalhavebla laboro. Ĉina Ligo de Esperantistaj instruistoj, kiel faka societo de ILEI, havas sian gravan mision por propagandi nian lingvon kaj elbaki esperantistojn. Dum lastaj jaroj en multaj altlernejoj funkcias E-kurso kiel nedevigita leciono kaj tiuj, kiuj elektis kaj finis la kurson, ricevas 2 poentojn.

### Nunaj problemoj

1. Komence de la kurso estas multaj lernantoj, malmultaj estas fine de la kurso, raraj persistantoj
2. Multaj salutantoj, malmultaj flue parolantoj.
3. Mankas praktiko en Esperanto kun alilandanoj.
4. Mankas bona kaj taŭga lernolibro por gestudentoj.

## La kialoj elmontriĝis en duflankoj

- De studentoj:
  - 1) Nur por gajni 2 poentojn.
  - 2) Ne scias kiel uzi ĝin aŭ praktiki ĝin.
  - 3) Malfacile persiste lerni Esperanton, multaj studentoj okupiĝas por prepari tutlandan ekzamenon de kandidataj magistroj aŭ serĉi laborpostenon.
  
- De instruistoj:
  - 1) Instrua metodo: Ankoraŭ uzi malnovan metodon same kiel instrui la anglan, la studentoj ne sentas novan kaj allogon.
  - 2) Lingva nivelo: Multaj instruistoj mem nur havas mezan eĉ malaltan nivelon de Esperanto, malbonan prononcadon, malfruan paroladon, tio malkredigis studentojn, ke Esperanto estas facila lingvo.

## Pruvsolvoj

1. Altigi interesiĝon de lernado, helpo starigi E-asocion por studentoj, inviti alilandanojn.
2. Altigi lingvan nivelon de instruistoj, plibonigi instruan metodon, entuziasme servi por studentoj, helpi korespondadon inter studentoj kaj alilandaj esperantistoj.
3. Rekomendi kaj gvidi studentojn al diversaj lokaj Esperanto-aktivadoj, someraj E-kursoj, k.a. por praktiki nian lingvon.
4. Rekomendi bonajn retpaĝojn kaj fondi rilatojn post ilia diplomitiĝo.

## Konkludo

1. Metodika kurso por instruistoj estas urĝe bezonata.
2. Seminario pri Esperanto-instruado kaj trejnado estas bona ŝanco por instruistoj kaj studentoj.

● Seminario – 6

## Ĉiutaga Esperanto!

PARK Yongseung (Nema)  
Vicprez. de Korea Esperanto-Asocio



### 1. Diagnozo pri la problemoj

- 1) Ni taksu la efikecon de niaj ĝisnunaj kursoj.
- 2) Fizika intervalo inter kursohoroj rompas konstantecon.

\* En ordinaraj kursoj, lernantoj ne povas renkonti Esperanton ĉiutage. Ĝis la sekvanta kursohoru, jam lerninta scio facile forflugas el la kapo.

### 2. 學 (lerni) kaj 習 (ekzercadi)

- 1) Lerni ne sufiĉas. Ekzercadi mankas.
- 2) La unua libro de Zamenhof grandparte enhavas la parton 習.
- 3) Instrui ne sufiĉas. Gvidi mankas.

\* Se iu nur 'lernas' en lernohoro kaj ne havas ŝancon 'ekzercadi', kvankam li povos 'kompreni' gramatikon, tamen li neniam posedos kapablon je vortoprovizo kaj elparolo. Kiam ni temas pri 'lerni Esperanton', nepre gravas 'ekzercado'. La unua libro de Esperanto celas ne nur komprenigi la lingvon, sed pli grave ĝi emfazas ekzercadon. Por perfekta lerno, necesas gvidado por ĉiutago.

### 3. Malhelpoj al la ĉiutaga 習.

- 1) Malfacilas trovi liberan libron ĉiutage pro manko de tempo.

- 2) Malfacilas doni motivon pro manko de ŝanco.
- 3) Malfacilas teni intereson pro izoliteco fizika.

\* Oni esperas lerni kaj fariĝi bona kapabla esperantisto, tamen lernantoj en lernejoj ne havas sufiĉan liberan tempon. Granda motivo povas altigi la pasion lerni, sed trovi taŭgan ŝancon kaj daŭrigi tion estas ne oportuna afero. Malofteco de renkontiĝo estas solvenda problemo por nuntempaj lernantoj.

4. Kia ilo necesas por realigi la ĉiutagan ekzercadon?

- 1) Facile kaj rapide uzebla ilo por manko de tempo.
- 2) Grupigi lernantojn por savi ilin de izoliteco.
- 3) Materialoj desegnita precipe por tiu celo.

\* Por modernaj lernantoj kun supremenciitaj situacioj, kia ilo povos malsoifigi la problemojn ?  
La tri ecoj estas necesaj por solvi la problemon.

5. Provo kun bona ilo 'Kakaotoko' en Koreio

- 1) La plej vaste uzata en Koreio.  
Preskaŭ ĉiuj smartfon-uzantoj havas ĝin en sia telefono.
- 2) Rapida  
Kompare al Skajpo, Fejsbuko aŭ retpaĝaro,  
Kakaotoko ne postulas atendminuton por uzi.  
Tio ebligas homon uzi eĉ en tre mallonga tempopaŭzo.
- 3) Facila  
Ne bezonas ensaluti, ne bezonas kompreni multon.  
Neniu sentas timon por amikiĝi kun ĝi.
- 4) Grupigo  
Grupigi amikojn estas plej bone por nia celo
- 5) Foto kaj Sono  
La funkcioj estas utiligeblaj por ne nur vigla atmosfero, sed ankaŭ studmaterialoj

\* Kakaotoko similas al LINE, Viber, Mypeople, What's up. Sed, vere bonŝanca afero estas, ke preskaŭ ĉiu smartfon-uzanto en Koreio trovas la kakaotokon en sia telefono. Tio ebligas tutlandan ligan.

6. Aktualaj ekzemploj (kakaotokaj grupoj)

1) KEA oficiala

Oficiala KEA-grupo por tutlandaj esperantistoj.

Oni raportas novaĵojn kun fotoj por sciigi al la aliaj.

2) Ĉiutaga Esperanto

Ĉiumatene oni renkontas esperantaĵojn.

Modelaj frazoj, Idiotismaro

Kaj tie oni demandas, respondas kaj diskutas.

3) Geknaboj

Geknaboj renkontas ĉiutage kaj pritemas Esperantan lernon.

4) Parkerado

Ĉiumatene oni aŝiŝas unu parkerindan frazon.

Oni legas, parkeras kaj sonregistras per sia voĉo.

5) Bazaj kursoj

6) BRO (Baza Radikaro Oficiala)

\* Rezulto jam gajnebla estas, ke oni nun ĉiutagas Esperanton. Tio ne nur altigas ilian lingvan kapablon, sed ankaŭ proksimigas la rilaton kaj profundigas la intereson kaj sekve motivon daŭre ligi sin kun Esperanto kaj ĝia movado.

7. Imagebla bildo baldaŭ venonta

1) Lokaj filioj interŝanĝos siajn novaĵojn. Tio kuraĝigos malfortajn filiojn plani por sialoka movado.

2) Esperantistoj estos facile informitaj pri kunsidoj kaj kursoj per vivanta mesaĝado reciproka. Tio donas al ni senton, ke ni estas ĉiam ligitaj ne nur al Esperanto, sed ankaŭ al esperantistoj amikaj.

3) Kapablaj gvidantoj povas anonci kaj okazigi kursojn kaj grupan ekzercadon por helpi komencantojn aŭ aliajn dezirantojn.

4) Tiuj ĉi ebligas al ni 'ĉiutaga Esperanto' kaj tio nepre donos al ni bonan solvon pri edukado.

● Seminario – 7

## Lernolibro kaj Kurso

YAMASITA Toshiro (Belmonto)



### I. Kia estas bona lernolibro?

#### 1) Teksto kun nur literoj

Ofte ni uzas lernolibron plenan de nur literoj; ĝi estus taŭga por gramatika enkonduko. Ĝi, tamen ofte ne ligas lernantojn al parola ekzerco, ĉar ili pensadas en sia nacia lingvo, kio baras ilin al flua, kaj senhezita parolado. Gvidanto devas doni ĝustan sonon aŭ voĉon, kaj vivstilon sufiĉe.

#### 2) Teksto kun bildoj

##### 2-1 Teksto kun scenaj bildoj.

Ĉi-tipa lernolibro prenas lernantojn al facila kompreno de

scenoj aŭ cirkonstanco, pri kio temas. Ili lernas per okuloj kune kun litero kaj sceno.

Gvidanto ankaŭ devas montri sonon aŭ voĉon kaj vivformon ĉi tie.

##### 2-2 Teksto kun bildoj po vortoj.

Ĉi tio gvidas lernanton al facila vorto-kompreno, plejparte sen ĝeno de nacia lingvo.

Mankas ĉi tie sono aŭ voĉo, kaj vivmaniero.

#### 3) Teksto kun sono

Se lernolibro provizas sonbendon kiel KD aŭ en sonformato mp3, tio estas pli bona rimedo por ligi literon kun sono; kaj se ĝi estos bona sonbendo, ilia lingvo fariĝos reala kaj viva. Bedaŭrinde, voĉaktoroj nur legas tekston sen viveco aŭ pasio en multaj KD-oj; nepre necesa estas tia sonbendo, kia montras realvivan interesan interparoladon.



#### 4) Teksto kun filmo

Plej bona lernolibro devas prepari interesan tekston, per kio lernantoj povas ĝui esperantan vivon. Necesa estas viva, energia, kaj dinamika teksto, per kio oni povas reverki scenaron aŭ manuskripton por produkti dramecan filmon.

Filmo donas al ni sonon, signifon de vortoj kaj agoj, kaj montras realan vivon.

## II. Gravaj punktoj

S-ro HORI Yasuo, honora membro de UEA, emfazis en fakkunsido dum vjetnama UK lastjara, ke KLM estas grava; notu, ke ĝi ne estas nederlanda aviadil-kompanio.

- “K” estas por "Klare": Oni devas elparoli en ĝusta prononco, klare aŭdebla. Nek en sono de sia nacilingvo.
- “L” estas por "Laŭte": Konversacio estas INTERparolado, ne murmuro per si mem; do parolu al aliulo sufiĉe aŭdeble, kontrolante sian voĉkvanton.
- “M” estas por "Malrapide": Ne babilu tro rapide, por ke nesamlingvanoj komprenu bone. Prof. LEE Jungkee antaŭjare rakontis al mi pri eŭropa UK kaj konfesis, ke eŭropanoj parolas Esperanton kiel sian nacilingvon, kvazaŭ mitraloj senĉesaj, pro kio aziaj esperantistoj estis solecaj, ne komprenante iliajn parolaĉojn. Ili devas pripensi, ke niaj aziaj landaj lingvoj, precipe ĉina, japana kaj korea, tute ne havas komunan radikon kun Esperanto, eĉ *UNU*.

Jen mi aldonos "F" laŭ instigo de HORI.

"F" staras por "Facile": uzu facilajn vortojn plejeble.

Ekzemplo estas: "*aŭtodidakta* lernolibro" – kio estas tio? Ĝi ne estas libro al ŝoforo de aŭto! Eble fieras tiu, kiu konas ĝian signifon, kaj estus kontenta, ke li/ŝi estas saĝa kaj klera kaj intelekta, ĉar li/ŝi povas kompreni tiun malfacialn vorton, ne komprenatan de aliuloj! Sed se vorto estas fremda al kunparolanto, ĉu ĝi estas ilo por interparolado?

Bona solvo en ĉi tiu okazo; simple ni diru "*memlerna* lernolibro". Tio estas sufiĉa. Ni ne obeu hind-eŭropan lingvan kutimon, kio estas natura al ili, sed superflua kaj forĵetinda por azianoj. S-ro Park Yongseung jam prelegis tion kun analizo, en la unua ISOA en Tienĉino, 2011.

## III. Literatura E-kurso en “Luna Boato”

De majo ĝis decembro mi okazigis seriajn Esperanto-kursojn en la Literatura Salono "Luna Boato"(月の舟) en Kagoŝimo(鹿児島), la region-ĉefurbo, nome:

- 1) Esperanto por komencantoj
- 2) Lerne Esperanton kun "Kenzi"
- 3) Legi "Kenzi" – Ĝojo de Esperanto

Precipe, la dua kaj tria kursoj estis provoj ligi literaturon al Esperanto-lernado.

"Kenzi" estas populara persona nomo en Japanio, sed oni intime nomas la faman verkiston "MIYAZAWA Kenzi"(宮澤賢治) simple "Kenzi". Li estis la poeto kaj verkisto de infana rakonto, sed ne estis la sukcesa verkisto dum sia mallonga vivo(1896–1933). Li rezignis la postenon de agrikultura lernejo en regiono, kaj iris al Tokio en 1926 por "ellerni Esperanton", lerni tajpadon, kaj ekzerci violonĉelon kaj orgeneton. Post tio li provis traduki kelkajn poemojn esperanten. Sed lia vivkonstanco estis tre severa, kaj zorgante malriĉajn kamparanojn aktive vivis per tuta forto ĝis sia morto. Post lia forpaso oni trovis grandan kvanton da manuskriptoj ne aranĝitaj, kaj post penega aranĝo publikigis multaj volumoj de liaj verkoj. Japanoj fervore amis lin, kaj esperantigis multajn verkojn.

Mi intencis enkonduki Esperanton en literaturan atmosferon, ĉar la placo estas "literatura salono", kie oni multe studas kaj prelegas pri japana literaturo. Mi elektis la tradukon de "Nokto de la Galaksia Fervojo", farita de KONISI Gaku.

Vi atentu, ke malfacilaj esprimoj rekte aperas en tradukaĵoj, ĉar la nacilingva originalo estas la talenta kaj sentoplena animbrilo de la verkisto, kaj konsekvence, tute nature tradukisto klopodas ĝustan anstataŭigon de la lingvo, t.e. apero de senĉesaj kompleksaj vortouzadoj kaj frazkunmetoj.

"Galaksia Fervojo" de Kenzi allogis mezjunajn kursanojn en sabato, kaj nokta kurso en merkredo allogis maljunajn virinojn, el kiuj iuj fervore venis al la salono, ŝoforante malproksimajn noktajn vojojn.

Sed la traduko ne estis facila al komencanto. Jen cito de unu alineo el la libro:

Tiam, de ie malproksime, sonis mistera voĉo anoncanta: "Stacio Galaksia! Stacio Galaksia!" Kaj tute abrupte, fulme ekheliĝis antaŭ liaj okuloj, kvazaŭ oni per unu fojo fosiligus mil miliardojn da lampirloligojn kaj mergus ilin tra la tuta ĉielo, aŭ kvazaŭ iu abrupte disĵetis la tutan stokon de diamantoj, kiujn la juvelfirmao kaŝis por subteni la prezon ŝajnigante produktomankon. Giovanni senintence frotis al si la okulojn, eĉ kelfoje.

Jen mia faciliga provo:

Tiam sonis mistera voĉo. Tiu voĉo venis de ie, malproksime, kaj diris: "Stacio Galaksia! Stacio Galaksia!"

Kaj subite ĉio fariĝis hela antaŭ liaj okuloj. Tio ŝajnis: iu ŝtonigis multe da lampo-insektojn, kaj metis ilin sur la tuta ĉielo. Tio ankaŭ ŝajnis: iu eltiris kaŝitajn diamantojn el de diamanto-kompanio, kaj disĵetis ĉion. La okulojn Ĝovani frotis multajn fojojn.

En la kurso, ni unue ekzercis ĉapitrojn de La Unua Libro, poste legis la tekston de la Galaksia Fervojo unuvoĉe dum duonhora.

Mia sperto klarigis, ke tradukita verkaro estas malfacila por kurso, eĉ se ĝi estus por infano. Samtempe, tamen, fama verko logas multajn literatur-ŝatantojn.

Jen mi proponu: iuj el vi verku emocian rakonton kun riĉa literatura aromo, originale kaj en la facila Esperanto, surbaze de kio oni povu fari ĝueblan filmon!

#### IV. Analizo de paroladoj kaj prelegoj


Mi analizis pri facileco kaj malfacileco, prenante materialon de la salutparoladoj kaj prelegoj en ĉi tiu broŝuro, pro kio mi petas viajn grandanimajn pardonojn.

Vidante ĉi-suban grafikaĵon, kiel vi analizas? Kies parolado aŭ prelego estas plej facila?

Rim-1 : "Gong2" estas por prelego de prof. Gong.


Rim-2 : "nokto" estas por la unuaj du ĉapitroj de "Nokto de la Galaksia Fervojo".

Rim-2 : "samaj" estas por vortoj uzitaj pli ol du-foje. "malsamaj" por 1-foja uzo.




Bildo 1

Jen estas alimaniere analizo.







Bildo 2


Ni devas noti, ke “samaj vortoj” estis uzitaj pli ol du fojoj; tio signifas, ke ili ne estas unu, sed multoblaj. Vidu la saluton de s-ro Stefan MacGill. Li uzis la artikolon “la” 17-foje, kio fariĝas 7 % de tuto, kaj prepozicion “de” 11 fojojn, 5 %.



La 3a ILEI-Seminario en Orienta Azio







1) Ju pli parolado aŭ prelego estas longa, des pli aperas multaj vortoj. Referencu d–ron Markus kaj "Nokto"–n.

Sed longeco ne rilatas facilecon en iu senco. Ĉe d–ro Markus unuaj 11 cirklopecoj okupas kvaronon, kaj la lasta peco (unufoje uzita) estas malpli ol duono. Ĉe "nokto", tamen, unuaj 12 rondopecoj okupas kvaronon, sed la lasta peco superas duonon. Kaj ĝi uzas komplikan frazfaradon laŭ la originala verko, kio baras fluan komprenon.

2) Pri frazoj de prof. Lee, prof. Gong, kaj s–ino Isikawa ni certas, ke ili estas facilaj. La salutoj estas mallongaj, kaj do, uzas nur limigitajn vortojn.

3) Do, samaĵon ni povas konkludi al s–ro Stefan MacGill? La bildo ŝajnas sama kun aliaj prelegantoj; sed atentindaj estas aperoj de ne facile komprenebaj vortoj por komencantoj aŭ azianoj, inkluzive fakajn vortojn, eble de eŭropa tendenco.

Ekzemple:

aranĝo, apogi, avantaĝo, defio, diveno, efike, fake, kadre, logikigita, kontinento, obstaklo, organizado, percepti, provizi, rekorde, rilate, sekcio, sojlo, substreki, trakti, unuopulo

## Principoj por la 125-parta retkurso


Stefan MacGill / Prezidanto de ILEI

Tiu ĉi dokumento estas sendita de s-ro Stefan MacGill, prez. de ILEI, okaze de la 3a ISOA por seminarianoj. Bv. efike utiligu ĝin por Esperanto-instruado en via lando.

- La kurso estu cel-lingva kaj abunde ilustrita.
- La bazo estu originala didaktika ŝuparo, bazita sur la unikaj kvalitoj de la lingvo: Kio unike malfacilas?
- La kurso estu, sekve, tre verbo-centra kun atento al la kategorioj de la verboj.
- La situacioj de la kurso estu alloga al la unuavica cel-grupo – junuloj en komputila mondo.
- La situacioj estu pli kaj pli variaj, transkulturaj kaj inkluzivu erojn pri la esperanta vivo mem.
- Paralele al la situacioj, estu gramatika prezentado, kun klarigoj en tia Esperanto kiun la studanto en difinita punkto jam regas.
- La kurso inkluzivu son- kaj film-materialon.

### La didaktika ŝuparo – pli ol temlisto


Temoj kun fortigo, aliaj situacioj; temoj en kombino





## Plugrimpe – la didaktika stuparo

Ju pli da temoj, des pli da kombinoj, des pli da ebloj...



Jen grafikaĵoj, bazitaj sur diagramo de Benjamin Bloom (1956) kaj Pohl (2000). Ili montras la proporciojn da tempo je dispono por lingvo-lernaj edukaj celoj. Maldekstre, la situacio por Esperanto, dekstre tipa situacio por nacia lingvo. Esceptoplenaj aŭ komplikaj naciaj lingvoj starigas grandajn postulojn por memorigo kaj kompreno. Male ĉe Esperanto eblas pasi rapide tra tiuj kaj dediĉi pli da tempo al pli altnivelaj pensformoj: aplikado, analizado, taksado kaj kreado.



**Diskutu:** Kiom validas la prezentita skemo por lernantoj de Esperanto el Azio? Eble gravas, kiam da aliaj hind-eŭropaj lingvoj estas jam konataj al la lernanto. Kaj se neniom ...?

**Tasko:** Aanlizu la sekvan temaron kaj pripensu, ĉu eble azia varianto povus esti inda kaj utila. Kiu pretus elpensi aziajn temojn, rolulojn kaj situaciojn.

## Etapoj por la 125-parta retkurso (proponata ordigo)

1. Saluton! Mi estas Jan! Jen mia komputilo, klavaro, muso, ekrano, tablo...  
La komputilo estas mia. **Poseda pronomo** mia
2. Mia komputilo estas rapida, moderna. Mia kato estas maldiligenta kaj malrapida.  
Mal-. **Adjektivoj**.
3. Mi staras, mi sidas, mi kuras, mi promenas, mi laboras, mi ripozas, mi ne dormas.  
**Netransitivaj verboj**. **Libera vortordo**.
4. En, sur, de, sed. Ĝ: seĝo, ĝardeno, bestoĝardeno, ĝirafo, ĝi, ĝia, ĝusta, ĝena, larĝa, seĝo, loĝas. En mia ĝardeno ne estas ĝirafo. La ĝirafo estas en la besto-ĝardeno. En la reto, reklamo estas ĝena. Mia hundo loĝas en mia ĝardeno.
5. Kun, sen. Venas, iras. Jen mi kun mia mirinda komputilo. Jen mi sidas en la ĝardeno kun mia libro. Jen vizaĝo kun ...

### Ekzemplo el la unua etapo

 <p>Saluton! Mi estas Jano</p>	 <p>Jen mia tablo.</p>	 <p>Jen mia komputilo.</p>
Jen Jano.	La tablo estas mia.	La komputilo estas mia.
 <p>Jen mia komputilo kaj mia muso.</p>	 <p>Jen mia libro.</p>	 <p>Jen mia orelo kaj mia kraĵono.</p>
La muso estas mia.	La libro estas mia.	La kraĵono estas mia.

Ekzemplo el la dua etapo

		<p><b>Adjektiva listo:</b></p> <table border="0"> <tr><td>Bona</td><td>Bongusta</td></tr> <tr><td>Malbona</td><td>Malbongusta</td></tr> <tr><td>Varma</td><td>Longa</td></tr> <tr><td>Malvarma</td><td>Mallonga</td></tr> <tr><td>Rapida</td><td>Granda</td></tr> <tr><td>Malrapida</td><td>Alta</td></tr> <tr><td>Moderna</td><td>Utila</td></tr> <tr><td>Malmoderna</td><td>Diligenta</td></tr> <tr><td></td><td>Nova</td></tr> </table>	Bona	Bongusta	Malbona	Malbongusta	Varma	Longa	Malvarma	Mallonga	Rapida	Granda	Malrapida	Alta	Moderna	Utila	Malmoderna	Diligenta		Nova
Bona	Bongusta																			
Malbona	Malbongusta																			
Varma	Longa																			
Malvarma	Mallonga																			
Rapida	Granda																			
Malrapida	Alta																			
Moderna	Utila																			
Malmoderna	Diligenta																			
	Nova																			
<p>Mia radiatoro estas varma.</p>	<p>Mia fridujo estas malvarma.</p>	<p>Adjektivo = a-vorto</p>																		
<p>Mia kato estas mal-diligenta kaj kontenta.</p>	<p>Nun mia kato estas malrapida.</p>	<p>Nun mia kato estas rapida.</p>																		

Ekzemplo el la dua etapo

		<p>La kvadrata radiko de sesdek kvar? Estas ok!</p>
<p>Mia kraĵono estas akra.</p>	<p>Mia kraĵono estas malakra.</p>	<p>Mia menso estas akra!</p>
<p>Mia muso estas moderna kaj utila.</p>	<p>Mia alia muso estas impertinenta!</p>	<p>Mia najbaro estas bela!</p>

6. Sub, super, inter, apud. Venas, iras. Mi staras en mia ĝardeno sub la arbo, mi sidas sur mia seĝo, mi promenas apud la tablo. En la ĝardeno, pomo pendas super mi. En la domo, mia hejmtasko pendas super mi. [Prepozicioj](#);
7. Al, de (por direkto), por. Kato! Manĝo sur la tablo ne estas por vi! Via manĝo estas sub la tablo!  
[Resumo pri netransitivaj verboj, libera vortordo: Venas -o, -O venas.](#)
8. Mi movas la muson. Mi rigardas la ekranon. Mi vidas reklamon. Ba! Mi batas klavon. Mi manĝas pomon. Mi trinkas limonadon. Ni levas bretaron. [Transitivaj verboj.](#)
9. Mi movas mian muson. Mi klakas ĝian butonon. Mi legas mian libron en la ĝardeno. [Profundigo; pronomoj en akuzativo.](#)
10. Ŝ: puŝas -on, ŝovas -on, Mi viŝas la ekranon. Mi paŝas, kuŝas. La komputilo kraŝas. Ĝi estas ĝena komputilo.

*Gramatiko per la jam donitaj vortoj kaj strukturoj (el etapo ses)*

**Kato** estas vorto, sed ĝi ne estas verbo. Ĝi estas substantivo.

**Staras** estas verbo, sed sen subjekto, do ĝi ne estas frazo.

**Mi staras.** Jen frazo: la verbo estas kun subjekto.

\* Subjekto sen verbo ne estas frazo. Verbo sen subjekto ne estas frazo.

\* Ne validas por vetero-verbo: **Pluvas.** Jen unu-vorta frazo.

Jen vetero-verba listo: Pluvas, Ventas, Hajlas, Neĝas, Tondras, Sunas.

(nekompleta listo!)

**Ekzemplo:**

En la frazo: **La hundo staras,**

**La** estas la artikolo, **hundo** estas la subjekto (kaj substantivo!)

kaj **staras** estas la verbo.

*Sekvas en la kurso fraz-analiza ekzerco, la tuto per lernitaj vortoj.*

## Amuza Lando de Esperanto

MA Youngtae / Docento de Esperanto en Univ. Dankook



Kio estas Lando de Esperanto? Alivorte, Esperantujo? Laŭ la difino de PIV, ĝi estas "la tuto de la lokoj kaj institucioj, en kiuj Esperanto estas uzata."

Kio do estas *Amuza Lando de Esperanto*? Ĝi estas nomo de la programo, kiun mi iniciatis kaj komencis praktiki en 1998 por ebligi al miaj lernantoj lerni Esperanton pli efike kaj amuze, utiligante diversajn amuzajn aferojn, t.e. kantoj, didaktikaj ludoj kaj humuraĵoj.

Do, ni nun estas en Lando de Esperanto kaj estas pretaj ĝui la programon de *Amuza lando de Esperanto*, formetante la seriozajn prelegojn.

### [Resumo de la programo]

- Horo : ĉ. 60 minutoj
- Enhavo: Por ke lernantoj povu amuze lerni kaj praktiki esperantajn vortojn kaj frazojn por altigi lingvokapablon de Esperanto,
  1. Kantu kune!
  2. Ĝuu ludojn didaktikajn!
  3. Ridigu lernantojn per humuraĵoj!
- Kelkaj helpantoj estas bezonataj por plenumi la programon.

1. Kantoj : Kantoj faras la atmosferon de kunvenoj gajaj kaj la ĉeestantojn agrablaj. Pro tio, kantante, oni povas malfermi la koron kaj koncentri sian atenton al la esperantaj kursoj kaj kunvenoj. Des pli estas *kanti internacie!*

– Gratulon al vi!

(por la naskiĝo en la dua lando Esperantujo. Esperantistoj havas du naciecojn: propra kaj Esperantuja)

– Vivu la verda stel'

– Kaj aliaj kantoj de diversaj landoj

2. Ludoj : Ludoj igas la ĉeestantojn movi 4 membrojn, kaj vigligas cerbon. Praktikante didaktikajn ludojn, oni povas ripeti jam lernintajn vortojn kaj frazojn, aŭ akiri la novajn (vortojn kaj esperimojn).

Ekzemple:

kalkulado per fingroj en diversaj manieroj / kapo ŝultro genu' pied' genu pied' / vort-ludo en grupo (5:5) / 4-vorta divenigo / serĉi komunajn vortojn / ludo de ĉenvorto / serĉi la familiajn vortojn. Precipe "serĉante la familiajn vortojn", oni povas esplori multajn vortojn:

\* Monto: tero, roko, arbo, birdo, valo, fonto, rano, nesto, herbo, serpento ktp.

Kiam oni donas la vorton "monto", oni devas diri tion, kio troviĝas en la monto, aŭ: el kio konsistas la monto.

3. Humuraĵoj : "Rido estas ne nur kuracilo por nia koro, sed ankaŭ bona beligaĵo por nia korpo. Vi estas la plej bela, kiam vi ridas." – Karl Josef coosell

\* Jen estas kelkaj spritaj kaj agrable ridigaj la humuraĵoj:

Diri la veron / La peko kaj la pardono / Bona ideo / Ebria patro / Virino kaj furzo / Napoleono / Facila Decido / Malfacila Entombigo / La Ĝirafo / Noto en Ekzameno / En cirko

★ *Bone amuziĝu! Kaj refreŝiĝu por sekvantaj programeroj!*

## Mi kaj “mia biciklo”

XIONG Hui (Urso)

Magistra studento en Nanchang-Universitato, Ĉinio



Saluton, karaj amikoj.

Mi estas Urso el la urbo Nanchang, Ĉinio, kaj magistra studento pri elektronika kaj mekanika inĝeniero.

Hodiaŭ mi parolos pri mia esperanta sperto kaj kelkaj ideoj. La titolo de mia parolo estas “Mi kaj mia biciklo”. Sed kial mia biciklo rilatas kun Esperanto? Ĉu estas rakontoj inter ili? Kompreneble jes! Kaj Ĉi tie ekzistas du signifoj.

Pro la grandeco de mia universitato, ni devis aĉeti biciklojn anstataŭ piediri. Per la biciklo, ni povas ŝpari tempon por fari aliajn aferojn.

Do la biciklo akompanas min multe ekster de la universitato. Kiam mi partoprenis E-aktivadon, ankaŭ ĝi estis tie. La biciklo spertis mian esperantan aktivadon dum mia universitata vivo. Ankaŭ ĝi estas partoprenanto, kvankam ĝi estas senviva. Tio estas surfaca signifo.

Pri la interna signifo, mi iam vidis la frazon “Angla lingvo estas kiel bona aŭto, kiu trairas bonajn ŝoseojn, sed Esperanto estas kiel biciklo, kiu povas iri ĉien!” Mi opinias ke ĉi tiu frazo bone klarigas la diferencon inter la angla lingvo kaj Esperanto, kaj ankaŭ indikas la avantaĝon de Esperanto. Do, antaŭ ol iri ĉien, ni devas ellerni kiel konduki la ‘biciklon’, kiel funkciigi Esperanton. Sekve mi rakontos al vi pri mia lernado de Esperanto.





Mia renkontiĝo kun Esperanto estas je la dua duono de 2008, en la nedevigita kurso pri Esperanto, gvidata de prof. GONG Xiaofeng(Arko). La unua lernolibro, kiun mi uzis, estas "rekta-metodo por lerni Esperanton". Unue, mi ne tre interŝiĝis pri Esperanto, ĉar mi pensis ke ĝi nur estas alia lingvo por lerni, kaj mi devas elspezi tempon por ĝi, sed mi ŝanĝis mian vidpunkton ekde kiam mi partoprenis la

Zamenhof-Tagon en decembro, 2008. Partoprenante, mi nur eldiris kelkajn vortojn kun la esperantisto el Niĝerio, multe da tempo mi nur aŭskultis kaj ne komprenis. Sed mi avidis la kapablon interparolan, kaj mi sentis, ke la atmosfero inter la esperantistoj estas paca kaj amika.

Post ĉi tiu renkontiĝo kun esperantistoj, mi decidis lerni Esperanton bone. Do kiam mi memstudis, mi iris eksteren kaj laŭte legis la esperantan libron. Iom post iom, mi povis legi la tekston flue. Tio formigis mian fundamenton de Esperanto, sed post tio mi ankoraŭ ne povis interparoli flue, ĉar mi ne ekzercis babiladan kapablon. Nur legi kaj skribi.

Post tio, oktobre 2009, mi partoprenis la 2an Lushan-Forumon en la urbo Jiujiang, najbara urbo de Nanchang. Samtempe, la seminario de instruado de ILEI-Ĉinio ankaŭ estis okazita. Tie, mi renkotiĝis kun pli da geesperantistoj, en- kaj ekster-landaj. La forumo ne daŭris longe, do mi ne havis ŝancon por babili kaj ekzerci.

La frukta aktivado, ĉe kiu mi progresis multe, estas la seminario de instruado de ILEI-Ĉinio en la urbo Taiyuan. Dum la seminario, mi loĝis kun prof. Ron, esperantisto el Usono. Dum la seminario, mi helpis kaj akompanis alilandajn esperantistojn, kaj en la etoso de Esperanto, mi nur povis paroli Esperanton. Do, iom post iom, la vortoj, kiujn mi lernis, elbuŝiĝis, kaj mi povis interparoli flue. Post la seminario, mi akompanis kun prof. Ron, prof. Arko kaj Sofia por preskaŭ unu monato, kaj mia aŭda kaj parola kapabloj altiĝis, por fundamenta ĉiutaga babilado, tio ne plu estas problemo.

Post tio, mi partoprenis en la 2a Vintra Esperanta Kursaro en Kantono, kiu estis gvidita de Dennis, esperantisto el Usono, li estas tre bona instruisto. Dum la 2a VEK, mi estis kiel help-instruisto de Dennis, kaj gajnis multe da trejnado kaj praktikado.

Ĉiufoje mi partoprenis en E-aktivado, mi iom profitis de ĝi. La 1-a ILEI-Seminario en



Orienta Azio, okazis en la urbo Tianjin, la 3a kaj 4a Lushan-Forumo en mia urbo, kaj tiel plu. La frukto ne nur estas pri E-nivelo, sed aliaj flankoj, mi scipovas kiel krei videojn, mi organizis E-aktivadon kun aliaj personoj, mi prezidis Interkongan vesperon esperante, kvankam mi ne bone faris tion. Mi fondis Esperant-asocion en mia universitato, kaj aliajn aferojn. Se mi ne lernis Esperanton, tio ne okazis. Do, dankon al Esperanto, dankon al la homoj, kiuj iam helpis min.

Do, de mia lernado de Esperanto, mi resumis kelkajn ideojn.

Por enmanigi Esperanton, mi proponas kelkajn fundamentajn kondiĉojn.

Fundamento:

1. Bona prononcado kaj kapablo de flua legado.
2. Memori sufiĉe da vortoj.
3. Intereso pri Esperanto.
4. Por interparoli esperante, havi bonan etoson de Esperanto.
5. Multe da praktikado de Esperanto.



La malfacilaĵoj nepre ekzistas en la lernado de Esperanto, sed kompare kun la avantaĝoj de Esperanto, mi daŭrigos mian esperantan vivon. Ĉar mi scipovas paroli Esperanton, mi trovas amikojn, kiuj parolas Esperanton tra la mondo. Tio estas granda riĉeco por mi. ☞

**Poste,**

● Raporto pri la 3a ISOA

## La 3a ISOA okazis fruktplene

LEE Jungkee / Estro de korea sekcio de ILEI



De la 21a ĝis la 24a de jan., 2013 okazis 'La 3-a ISOA' en la urbo Iksan, Koreio. La 1-a ISOA okazis en la urbo Tienjin, Ĉinio en 2011, kaj la 2-a ISOA en la urbo Kunming kiel unu el la programeroj kadre de la 45a ILEI-konferenco.

En la seminario, ĉeestis 41 esperantistoj ne nur el Orienta Azio sed ankaŭ el ekster la regiono. (El Koreio 25, Ĉinio 9, Japanio 4, Hungario 1, Novzelando 1 kaj Litovio 1). Ĝi abundis je diversaj temoj rilate al la seminaria temo 'Esperanto-instruado en lernejo'. Jen mi listigas la temojn, kiuj estis prezentitaj en la renkontiĝo.

La utileco de Esperanto en mia profesia kariero (MARKUS Gabor el Hungario), Universitata E-Edukado en Koreio (LEE Jungkee el Koreio), La junulaj movadoj de Esperanto en Heilongjiang Provinco, Ĉinio (SONG Ping el Ĉinio), E-instruado en japanaj lernejoj (ISIKAWA Tiekō el Japanio), Komunaj problemoj pri E-instruado/lernado en ĉinaj altlernejoj (GONG Xiaofeng el Ĉinio), Ĉiutaga Esperanto! (PARK Yongseung el Koreio), Lernolibro kaj kurso (YAMASITA Tosihiko el Japanio), Amuza lando de Esperanto (MA Youngtae el Koreio), Mi kaj mia biciklo (Xiong Hui el Ĉinio), kaj invitita leterprezentado de Stefan MacGill, prez. de ILEI, kun la temo 'Principoj por la 125-parta retkurso'

Post la respektivaj prezentadoj sekvis arda diskuto kaj disputo. Dum la seminaria periodo oni ĝuis la duontagan ekskurson en la najbara urbo Jeonju, kiu estas fame konata kiel la urbo de antikva heredaĵo. La ekskurso estis gvidita de s-ino CHOI Eunsuk, esperantista ĉiĉerono.

Tra tiu ĉi seminario, ĉiuj ĉeestantoj memspertis, ke la komuna kunsido inter ĉefe trilandaj ILEI-anoj estas tre signifplena kaj indas daŭrigi la seminarion senpaŭze por plialtigi lingvokapablon kaj por pliprofundigi instruo-sciojn, kiujn ILEI-anoj memspertis.

Estas notinde, ke 55-paĝa seminaria libro estis jam presita fare de s-ino CHO Myungja(Ĝoja) antaŭ la seminario kun prezentotaj dokumentoj. Tio estis tre oportuna kaj efika por sukcesa seminario. Profitante tiun ĉi ŝancon, mi kore dankas al ĉiuj, kiuj sendis sian prezentaĵon anticipe por la libro.

La 4a ISOA okazos en Japanio en 2014. Transdonante la verdan standardon de korea sekcio al la japana, la 3a ISOA fruktplene fermiĝis kun la promeso, ke ILEI-anoj rerenkontiĝos venontjare en Japanio. ☸

● Partopreninte en la 3a ISOA

## Bela renkontiĝo, sukcesa ISOA

GONG Xiaofeng<sup>35)</sup>

Estro de Ĉina sekcio de ILEI

Kun granda ĝojo kaj riĉa rikolto mi finis mian duonmonatan vojaĝon(2013.1.16.~1.30) en Koreio. Se resumu ĝin per kelkaj vortoj, mi pensas, ke estas jenaj: Bela renkontiĝo kun esperantistoj, bona impresoj pri la 8-a Internacia Renkontiĝo de Meditado kaj la 3-a ILEI-Seminario en Orienta Azio(ISOA), sukcesa komunikado pri E-instruado, ĝuo de Esperanta etoso.

Kiel simpla ĉeestanto, mi havigis al mi tre bonan kaj neforgeseblan sperton en Koreio, tio ne estas komparebla kun tiuj Esperanto-eventoj, kiujn mi kiel ĉeforganizanto zorgis en Ĉinio dum lastaj 5 jaroj, ĉar dume mi ĉiufoje estis streĉita kaj elĉerpita kaj apenaŭ povis ĝui la tuton. Tamen ĉi-foje, mia koro ĉiam estis ĝoja kaj malstreĉita, pro tio mi multe ĝuis kaj bele spertis. Pri tiu ĉi bela renkontiĝo, mi ricevis bonan impreson, speciale de jenaj flankoj:

### Bone aranĝita laboro

Alvenis al Koreio 13 ĉinaj esperantistoj por la du eventoj, 6 el ili estas membroj de ILEI. Estis la unua fojo viziti Koreion por ni ĉiuj, krom s-ino SONG Ping. Neatendite, ke



Partoprenantoj el Ĉinio

ILEI-Koreio bone aranĝis ĉion: esperantistoj akceptis nin ĉe flughaveno, trovis gastigantojn aŭ malmulte-kostan hotelon kaj mendis trajnbiletojn por ni.

Esperantistoj en Busan eĉ zorgis nian postseminarian turismon tie kaj bone regalis nin. Ĉio ĉi kortuŝis nin ĉinaj partoprenantoj.

35) Estrarano de ILEI kaj prez. de Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj

### Bela konferenca libro

Tute malsame kiel la okazigintaj du sesioj de ISOA, ILEI-Koreio preparis tre belan kaj altnivelan libron antaŭ la seminario. Stefan MacGil, prez. de ILEI, alte taksis la majestan 55-paĝan dokumenton: “Kia brila modelo por ĉiuj organizantoj de eventoj – pretigi ĉion antaŭ la aranĝo, anstataŭ lukti tra monatoj poste, kun tuta malcerto pri fina livero. Kiel ekzemplo de 'plej bona praktiko' ĝi estas nepre vaste koninda.” Ĝi meritas ĉian laŭdon.



En la urbo Busan post la 3a ISOA

### Akademijaj interŝanĝoj

Sendube, depost la kunlaboro inter tri sekcioj (ĉina, korea kaj japana), ILEI progresas rapide en Azio. ISOA ne nur fortigas la ligojn inter instruistoj de la orienta Azio sed ankaŭ kunigas diversnaciajn esperantistojn. La ĉeftemo estas “Esperanto-instruado en lernejo”. Sume estis 8 prelegoj pri E-instruado en lernejoj ĉinaj, japanaj kaj koreaj, pri instruaj metodoj kaj lernolibroj, kaj ceteraj. De kiu ajn flanko oni ĝin ekzamenas, tiu ĉi ISOA estas altnivela, sendube ankaŭ sukcesa.



Kun la membroj de Incheon-filio post la 3a ISOA

### Familia etoso

Mi ne povas forgesi tiujn tagojn, kiujn ni kune pasigis en Iksan. Ĝis nun la pasintaj okazaĵoj multfoje aperis antaŭ miaj okuloj. Neforgeseblis, ke ni ofte eksplode ridis pro la amuzaĵoj, ke ni kune babiladis kaj ekskursis. Ĉio ŝajnas, ke ni estus familianoj. Kvankam la vetero ekster la domo estis malvarma, tamen en nia koro ni sentis, ke ni jam estas en printempo. ☁

● Partopreninte en la 3a ISOA

## Geamikoj kun varma koro en malvarmega Koreio

ISIKAWA Tiekō  
Estro de japana sekcio de ILEI

La plej granda timo, kiun mi havis antaŭ mia alveno al Koreio, estis malvarmeco. Oni diris, ke temperaturo en Koreio ofte falas ĝis  $-15$  centigradojn. Mi neniam spertis tian malvarmecon! Mi vestis min per islandjako, la plej dika el miaj havaĵoj; en Japanio mi malofte surmetas ĝin, ĉar ĝi estas tro dika ĉi tie!

Ĉiuokaze, mi atingis la flughavenon Gimpo je 22:20, la 20an de januaro. Tiun tagon mi devis ĉeesti estrarkunsidon de Japana Esperanto-Instituto(JEI) ĝis la 17:00, kaj tuj post la fino de la kunsido mi rapidis al la flughaveno. Tre bonŝance en Gimpo mi povis preni la lastan rektan buson al la urbocentro, al mia hoteleto. Jam estis noktomezo.

*Elstara* estis la unua korea esperantisto kun varma koro, kiu venis la sekvantan matenon konduki min al la stacio Yongsan per taksio. Tie mi renkontis kelkajn koreajn geamikojn kaj tri ĉinojn. Unu el ili estis *Urso*, kun kiu mi jam en 2010 konatiĝis en Ĉinio. Ni estis en la grupo de ĉirkaŭ dek homoj el tri landoj, kaj koreaj geamikoj bone zorgis pri ni kaj donis al ni manĝaĵojn.

En la urbo Iksan, kie okazis la 3-a ISOA, mi havis bonŝancon konatiĝi kun multaj aliaj koreoj, kiuj bonvenigis nin. ISOA jam estas la triafoja, kaj sekciestroj de Ĉinio, Koreio kaj Japanio jam havas fortajn fidindajn rilatojn, do mi havis nenian timon pri la organizado de la seminario.

La unua preleganto estis s-ro Markus Gabor el Hungario. Li parolis pri la utileco de Esperanto en sia profesia kariero. Ankaŭ en la lasta UK en Hanojo, mi aŭskultis lian prelegon. Dum restado en Iksan, mi hazarde eksciis, ke li vizitos Japanion en majo kaj junio. Post reveno al mia hejmo, mi petis lin paroli en la oficejo de JEI kaj li volonte akceptis la peton. Tion alportis nia renkonto dum ISOA. Tia neatendita renkonto estas unu granda ĝojo por ĉeesti en internaciaj aranĝoj. En tiu senco, renkonto kun *Stonego* estis alia ĝojo.



Kun CHOI Taesok(Stonego) kaj KIM Uson

Mi nun ne intencas skribi detale pri la ISOA mem, ĉar mi pensas, ke aliaj homoj faros tion. Dum tiuj kvar tagoj, tamen, mi havis multan tempon plifortigi amikecon kun homoj, kiujn mi sciis antaŭ ol veni al Iksan. Ili estas *Ŝlosilo*, *Arko*, *Nema*, *Optimisto*, *Paco*, *Songanta*, *Leono*, *Natura*, ktp. Juna *Urso* multe progresis de post nia unua renkontiĝo en somero, 2010. Estis ankaŭ feliĉe konatiĝi kun novaj geamikoj koreaj kiel *Goja* kaj *Lumo*. Duontaga ekskurso al Jeonju okazis en pluvo. Ni marŝis sur kota tero, kio estis iomete malbona, sed ni ĝuis vizitojn al kelkaj lokoj. Fine ni kune sidis ĉe la tablo de luksa vespermanĝo, kiu tre bongustis. Mi dankas al nia ĉiĉerono *Esti*.



Kun Simone Robert(novzelandano) kaj LEE Youkyoung(koreo) en Seulo

La 24an, post la ISOA, kun kelkaj koreoj mi revenis Seulon. *Lumera* estis mia gastiganto; ŝi gastigis min kaj *Simone* el Tajvano, kiu loĝis tie ekde la 8a de januaro. La domo de *Lumera* estis ege komforta, precipe varma planko kaj lito tre plaĉis al mi. Ni tri multe babilis pri diversaj aferoj kaj bone komprenis. Fakte mi miris, ke *Lumera* treege bone parolas Esperanton kvankam ŝi komencis la lernadon nur antaŭ kelkaj monatoj. Ŝi vere oferis sian tempon por ni kvankam ŝi ne kutimas agadi ekstere dum vintro. Sen ŝi, mia restado en Seulo certe fariĝus malinteresa.

Dum mia oktaga restado en Koreio, la vetero estis severe malvarma, kaj mi iomete malsaniĝis. Sed mi ne bedaŭras mian decidon viziti Koreion en la plej malvarma sezono. Mi povis senti varman koron de koreaj geamikoj pli forte ĉi-foje. La 4-a ISOA okazos en Japanio, kaj estos nia vico varme akcepti vin. Mi esperas, ke multaj homoj kunvenos, diskutos kaj plifortigos amikecon. Mi atendos vin!

Laste mi denove dankas al ĉiuj, kiuj laboris por sukcesigi la 3-an ISOA-n kaj varme zorgis pri la partoprenantoj. ☸

# Organizantoj



Estro  
LEE Jungkee



Vicestro  
PARK Yongseung



Sekretario  
OH Soonmo



CHO Myungja



HAN Sookhee



Choi Eunsuk



LEE Youkyoung



## Prelegantoj



LEE Jungkee



ISIKAWA Tiekō



GONG Xiaofeng



MÁRKUS Gábor



SONG Ping



YAMASITA Toshiro



MA Youngtae



PARK Yongseung



SHIN Eunsook



XIONG Hui

La 3a ILEI-Seminario en Orienta Azio

## Partoprenantoj



41 partoprenantoj el 6 landoj: El Koreio 25, Ĉinio 9, Japanio 4, Hungario 1, Novzelando 1, Litovio 1



El Japanio: UENO Yuriko, YAMASITA Toshihiro, HUGXIMOTO Hideko, ISIKAWA Tieko



El Ĉinio: GONG Xiaofeng(Arko), XIONG Hui(Urso), LI Yuting(Bela), ZHUANG Yuan (Ĉarma), LIU Baoguo(Optimisto), MA Xin, XIONG Zhouxuan(Vera), SONG Ping(Paco)



MARKUS Gabor  
el Hungario



Simone Robert  
el Novzelando



CHOI Taesok  
el Litovio

La 3a ILEI-Seminario en Orienta Azio



El Koreio (de maldekstre): SHIN Jeha, KIM Sunwook, LEE Jungkee, JEONG Sunim, CHO Myungja, HAN Sookhee, PARK Yongseung, KIM Sungil, KIM Taegeon, JEON Daebong



El Koreio : LEE Sunhee, CHOI Eunsuk, LEE Migyeong, ???, JUNG Myunghee



El Koreio: MA Youngtae, PARK Yongseung, PARK Jongyuong, JOH Weonseok, KIM Uson, JONG Aija, MIN Hyeonkyeong, LEE Hyunmi, OH Soonmo, JUNG Hyeonju, SHIN Eunsook, KIM Sujung

# Memoraĵoj



La 3a ILEI-Seminario en Orienta Azio



La 3a ILEI-Seminario en Orienta Azio





La verdan standardon de la ILEI-Koresekcio al la estro de ILEI-Japansekcio, okazigonta la 4an ISOA-n (7~10, oktobro, 2014)

# **Sukcesona la 4a ISOA en Japanio, 2014**



## ● Adresaro de partoprenantoj

	Nomo	Lando	Urbo	Adreso
1	GONG Xiaofeng (Arko)	Ĉinio	Nanchang	
2	ZHANG Hong	"	Nanchang	
3	XIONG Hui (Urso)	"	Nanchang	
4	ZHUANG Yuan (Ĉarma)	"	Nanchang	
5	SONG Ping (Paco)	"	Harbino	
6	LI Yuting (Bela)	"	Beijing	
7	Xiong Zhouxuan (Vera)	"	Wuhan	
8	LIU Baoguo (Optimisto)	"	Baotou	
9	MA Xin	"	Baotou	
10	Gabor Markus	Hungario		
11	Ueno Yuriko	Japanio	Tokio	
12	HUGXIMOTO Hideko	"	Nagoya	
13	ISIKAWA Tieko	"	Tokio	
14	Yamasita Toshihiro (Belmonto)	"	Kagosima	
15	Simone Robert	Novzelando		
16	Oh Soon Mo (Brila)	Koreio	Seulo	
17	Shin Bun-sook (Songanta)	"	Sangju	
18	Lee Hyun Mi	"	Seulo	
19	Joung Ai-Ja (Libro)	"	"	
20	Lee Jung Kee (Ŝlosilo)	"	Anyang	
21	Ma Young Tae (Leono)	"	Yongin	
22	Kim Uson	"	Seulo	
23	Min Hyeonkyeong (Minmin)	"	"	
24	Jung Myung hee (Lumo)	"	Busan	
25	Jung Hyeon-ju (Natura)	"	Seulo	
26	Han Sook-hee (Kristalo)	"	Hapcheon	
27	Jeon Daebong	"	Bucheon	
28	Cho Myung-ja (Ĝoja)	"	"	
29	Jeong Sun Im	"	Buiwang	
30	Park Yongseung (Nema)	"	Busan	
31	Kim Tae Geon (Regalo)	"	Seulo	
32	Shin Je-ha	"	Yongju	
33	Choe Taesok (Ŝtonego)	"	Litovio	
34	KIM Sungil (Masoris)	"	Busan	
35	JOH Weonseok (Vintro)	"	Cheonan	
36	Kim Sujung (Kristal)	"	Seulo	
37	Na Jong Song	"	Junju	
38	Park Jong Yuong (Studema)	"	Cheonan	
39	Choi Eun-suk (Esti)	"	Junju	
40	Shin Cheol Min	"	Sangju	
41	Kim Sun Wook (Suno)	"	Seulo	

★ 41 partoprenantoj (16 viroj, 25 virinoj) : 26 koreoj, 9 ĉinoj, 4 japanoj, 1 hungaro, 1 novzelando


# La Espero

Movo de marŝo.

F. de Ménéil  
Teksto de d-ro L. L. Zamenhof



1. En la mond : on ven : is nov : a
2. Sub la sankt : a sign : o de l'Es :
3. Sur neŭ : tral : a lingv : a fun : da :




sent : o, tra la mond : o ir : as fort : a vok : o; perflug :  
per : o, kolekt : ig : as pac : aj ba : tal : ant : oj, kaj ra :  
ment : o, kom : pre : nant : e u : nu la a : li : an la pos :



il : oj de fa : cil : a vent : o nun de lok : o flug : u ĝi al  
pid : e kres : as la a : fer : o per la : bor : o de la Es : per :  
pol : oj far : os en kon : sent : o u : nu grand : an rond : on fa : mi :



lok : o. Ne al glav : o sang : on so : l : fant : a ĝi la  
ant : oj. Fort : e star : as mur : oj de mil : jar : oj in : ter  
li : an. Ni : a dl : li : gent : a kol : eg : ar : o en la :



hom : an tir : as fa : mi : li : on: Al la mond' e : tern : e mi : lit :  
la po : pol : oj di : vid : it : aj, Sed dis : salt : os la obs : tin : aj  
bor : o pac : a ne lac : ig : os, Ĝis la bel : a song : o de l'Hom :



ant : a Ĝi pro : mes : as Sankt : an har : mo : ni : on.  
bar : oj per la Sankt : a Am : o dis : bat : it : aj.  
ar : o por e : rit



ter : na ben' e : fek : tiv : ig : os.

## **Korea Sekcio de ILEI**

Adreso           Gangbyeon Hansin Core B/D 1601  
350 Mapo-dong, Mapo-gu,  
Seulo 121-703, Koreio

Telefono       +82-2-717-6974

Telefakso      +82-2-717-6975

Retpoŝto       kea@esperanto.or.kr

Hejmpaĝo      <http://www.esperanto.or.kr/>

<http://www.esperantoazia.net/club/myclub/?url> (ISOA)

